

**RICHARD CAPLICE**

*en kunlaboro kun*

**DANIEL SNELL**

**ENKONDUKO  
EN LA AKADAN**

Tria, reviziita eldono

*esperantigita de Michael Wolf*

*Ĉi tiu dokumento estas traduko de:*

Richard Caplice with the collaboration of Daniel Snell

Introduction to Akkadian

Third, revised edition

Biblical Institute Press, Rome, 1988

El la serio:

Studia Pohl: Series Maior

Dissertationes Scientificalae de Rebus Orientis Antiqui 9

ISBN: 88-7653-566-7

## TABELO DE ENHAVO

TABELO DE ENHAVO .....	1
MALLONGIGOJ.....	5
ENKONDUKE AL LA TRIA ANGLALINGVA ELDONO .....	6
§ 1. Antaŭparolo.....	6
§ 2. Laboriloj .....	6
§ 3. Geografio kaj lingvo.....	7
§ 4. La skribsistemo .....	8
a. Fizika formo de la signoj.....	8
b. Valoro de la signoj .....	9
c. Alfabeto reprezento de akadaĵ signoj.....	9
d. Ĉefa karakterizaĵo de la skribsistemo.....	10
e. Pliaj rimarkigoj pri la legado kaj transkribado de la akada .....	10
LECIONO 1 .....	13
NOMA DEKLINACIO, I: REKTA STATO.....	13
§ 5. Fleksio kaj rekta stato .....	13
§ 6. Formoj .....	13
§ 7. Genro.....	13
§ 8. Nombro .....	13
§ 9. Kazfunkcioj.....	14
§ 10. Pliaj notoj .....	14
§ 11. Nomoj kun vokalaj stamoj .....	14
§ 12. Tipaj variacioj en formo.....	15
§ 13. <i>aĥum</i> 'frato' kaj <i>abum</i> 'patro' .....	15
§ 14. La adjektivo.....	15
§ 15. Pri la lernado de kojnoskribaj signoj .....	15
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	16
LECIONO 2 .....	18
NOMA DEKLINACIO; II: ABSOLUTA KAJ KONSTRUITA STATO. PRONOMAĴ SUFIKSOJ.....	18
§ 16. Nomaj statoj.....	18
§ 17. Absoluta stato .....	18
§ 18. Konstruita stato .....	18
§ 19. Perifrazo per <i>ŝa</i> .....	20
§ 20. Posedaj sufiksoj .....	21
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	21
LECIONO 3 .....	24
G-STAMO DE FORTA VERBO (I).....	24
§ 21. La verbo ĝenerale.....	24
§ 22. Stamoj .....	24
§ 23. 'Tempoj' .....	24
§ 24. Verbtipoj kaj vokalklasoj .....	24
§ 25. La preterito .....	25
§ 26. La prezenco.....	25
§ 27. La imperativo .....	26
§ 28. La infinitivo .....	26
§ 29. La verba adjektivo .....	26
§ 30. La verba adjektivo .....	26
§ 31. Noma frazo .....	27

§ 32. Verba frazo .....	27
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	27
LECIONO 4 .....	29
G-STAMO DE FORTA VERBO (II). VERBAJ SUFIKSOJ.	
VENTIVO. SUBJUNKTIVO .....	29
§ 33. La stativo.....	29
§ 34. La perfekto.....	29
§ 35. Pronomaj sufiksoj .....	30
§ 36. La ventivo.....	31
§ 37. Kelka konfunkcioj .....	31
§ 38. La subjunktivo.....	32
§ 39. <i>ŝumma</i> .....	32
§ 40. Aliaj konjunkcioj .....	32
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	33
LECIONO 5 .....	36
Gt-STAMO. MODALOJ. DEMONSTRATIVOJ KAJ	
INTEROGATIVOJ.....	36
§ 41. La Gt-stamo.....	36
§ 42. Volitivaj (modalaj) konstrukcioj .....	37
§ 43. La kohortativo.....	37
§ 44. La prekativo .....	37
§ 45. La partikulo <i>lū</i> .....	37
§ 46. La vetitivo .....	37
§ 47. La prohibitivo.....	37
§ 48. Demandoj .....	38
§ 49. Demonstrativoj kaj interogativoj.....	38
§ 50. Negacio .....	38
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	39
LECIONO 6 .....	41
D-, Ŝ-, Dt-, Ŝt-STAMOJ. SENDEPENDAJ PRONOMOJ .....	41
§ 51. D-kaj Ŝ-stamoj kaj iliaj t- kaj tn-stamoj .....	41
§ 52. La D-stamo kaj la Dt-stamo .....	41
§ 53. La Ŝ-stamo kaj la Ŝt-stamo .....	41
§ 54. La sendependaj pronomoj .....	43
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	44
LECIONO 7 .....	46
STAMOJ N, tn, ŜD. NEDIFINAJ PRONOMOJ.....	46
§ 55. La N-stamo.....	46
§ 56. La Nt-stamo .....	46
§ 57. La tn-stamoj .....	46
§ 58. La ŜD-stamo.....	47
§ 59. Resumo pri la vokaligo en forta verbo .....	47
§ 60. Nedifinaj pronomoj .....	48
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	48
LECIONO 8 .....	51
VERBOJ III MALFORTAJ. ŜA .....	51
§ 61. Malfortaj verbaj formoj .....	51
§ 62. Verboj III malfortaj .....	51
§ 63. Determinativa-relativa pronomo.....	52
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	53

LECIONO 9 .....	55
VERBOJ II MALFORTAJ: NOMA TIPOLOGIO .....	55
§ 64. Verboj II malfortaj .....	55
§ 65. Noma tipologio .....	56
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	58
LECIONO 10 .....	61
VERBOJ I ' , J, N .....	61
§ 66. Verboj I Alef .....	61
§ 67. La <i>a</i> -grupo .....	61
§ 68. La verbo <i>alākum</i> .....	62
§ 69. La <i>e</i> -grupo .....	62
§ 70. Verboj I <i>j</i> .....	63
§ 71. Verboj I <i>n</i> .....	63
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	63
LECIONO 11 .....	66
VERBOJ I <i>w</i> . INFINITIVAJ KONSTRUKCIOJ. NOMBROJ .....	66
§ 72. Statverboj I <i>w</i> .....	66
§ 73. Agverboj I <i>w</i> .....	66
§ 74. Komenca <i>w</i> .....	67
§ 75. Infinitivaj konstrukcioj .....	67
§ 76. Numeraloj .....	68
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	69
LECIONO 12 .....	72
KVARKONSONANTAJ VERBOJ. <i>IZUZZUM</i> .....	72
DUOBLE MALFORTAJ VERBOJ .....	72
§ 77. Kvarkonsonantaj verboj .....	72
§ 78. La neregula N-stamo .....	73
§ 79. La neregula verbo <i>izuzzum</i> .....	73
§ 80. Duoble malfortaj verboj .....	73
§ 81. 'Tuta' .....	74
Vokablaro, kojnoskribaj signoj, ekzerco .....	74
SUPLEMENTO I .....	77
ĜENERALA FONETIKO DE LA AKADA .....	77
§ 82. Akada historia fonetiko .....	77
§ 83. Modeloj de konsonanta strukturo .....	78
§ 84. Modeloj de vokala strukturo .....	80
SUPLEMENTO II .....	83
NOMBROJ, DATADO, MEZUROJ .....	83
§ 85. Nombroj .....	83
§ 86. Jardatoj .....	83
§ 87. Monataj datoj .....	83
§ 88. Mezuroj de pezo .....	84
§ 89. Mezuroj de longo .....	84
§ 90. Areomezuroj .....	84
§ 91. Mezuroj de kapacito .....	85
AKADA-ESPERANTA GLOSARO .....	86
ESPERANTA-AKADA GLOSARO .....	92
INDEKSO DE SIGNOJ .....	96
INDEKSO DE SIGNOVALOROJ .....	98
PARADIGMO DE LA FORTA VERBO .....	101

**MALLONGIGOJ**

abs.: absoluta  
adj.: adjektivo  
AHw: (vidu § 2)  
ak.: akada  
akuz.: akuzativo  
ar.: araba  
as.: asiria  
bab.: babilona  
CAD: (vidu § 2)  
dat.: dativo  
GAG, GAG Erg.: (vidu § 2)  
gen.: genitivo  
GN: geografia nomo  
hebr.: hebrea  
imp.: imperativo  
indik.: indikativo  
inf.: infinitivo  
ing.: ingenra  
intr.: intransitivo  
jb.: junbabilona  
konj.: konjunkcio  
laŭv.: laŭvorte  
ma.: mezasiria  
mb.: mezbabilona  
med.: mediala  
mfb.: malfrubabilona  
mna.: malnovasiria  
mnak.: malnovakada  
mnb.: malnovbabilona  
na.: novasiria  
nom.: nominativo  
obl.: oblikva kazo (gen.-akuz.)  
perf.: perfekto  
pl.: pluralo  
PN: persona nomo  
prep.: prepozicio  
pret.: preterito  
prez.: prezenco  
ptc.: participo  
sing.: singularo  
skr.: skribe  
stat.: stativo  
subj.: subjunktivo  
sum.: sumera  
tr.: transitiva  
v. adj.: verba adjektivo  
vb.: verbo  
virg.: virgenra

## ENKONDUKE AL LA TRIA ANGLALINGVA ELDONO

### § 1. Antaŭparolo

La Enkonduko en la akadan estis unuafoje publikigita en 1980 kaj reeldonita en malgrave reviziita formo en 1983. Ĉi tiu eldono estas pli komplete reviziita kaj liverata kun indeksoj al la akadaĵ vortlistoj kaj signolistoj, angla-akada glosaro kaj paradigmo de fortaj verboj. La revizio profitis de proponoj esprimataj en recenzoj de la eldono de 1980 - precipe tiuj de J. Huehnergard, D. Snell kaj S. Dalley - samkiel proponoj private prezentataj, precipe de W. Farber, W.R. Mayer, R. Borger, W. Rölliĝ kaj W. Sommerfeld; al ĉiuj, kiuj prezentis proponojn mi esprimas mian dankon.

Ĉi tiu eldono ankaŭ profitas de la kunlaboro de prof. Daniel Snell, kiu kontribuis ampleksigitajn kojnoskribajn ekzercojn, la indekson de signoj kaj kopiojn de kojnoskribaj signoj tra la tuta libro.

Kiel antaŭe, la Enkonduko estas intencata kiel laborilo ofertanta dekdulecionan aŭ semestran kurson en esenca akada gramatiko. La ekzercoj por legado en transliterado kaj en kojnoskribo celas enkonduki la studenton en la ĝeneralan leksikon kaj en bazajn kojnoskribajn signojn. La ekzerco estas elektitaj el la malnovbabilona, sed la signoj estas enkondukataj, kiel kutime, en ilia novasiria formo; fonetikaj valoroj de signoj estas unuavice tiuj en la malnovbabilona uzataj, sed famaj valoroj el pli fruaj periodoj estas ankaŭ donataj, en krampoj. Aldone al la dek du lecionoj estas apendicoj traktantaj la akadan fonetikon kaj metrologion, indeksoj kaj paradigmo de la forta verbo.

### § 2. Laboriloj

La aŭtoritata gramatiko estas *W. von Soden, Grundriss der akkadischen Grammatik* [= **GAG**] (Analecta Orientalia 33, kun *Ergänzungsheft AnOr* 47 [= **Erg.**]).

La aŭtoritataj vortaroj estas *W. von Soden, Akkadisches Handwörterbuch* [= **AHw**] kaj *Chicago Assyrian Dictionary* [= **CAD**].

Por silabaj valoroj de kojnoskribaj signoj la klasika listo estas F. Thureau-Dangin, *Le syllabaire accadien* (1926). Kurantaj manlibroj listigantaj kojnoskribajn signon, ilian formalan evoluon kaj iliajn logografiajn kaj silabajn valorojn estas *R. Labat, Manuel d'épigraphie akkadienne* (5-a eld., reviziita de F. Malbran-Labat) kaj *R. Borger, Assyrisch-babylonische Zeichenliste* (Alter Orient und Altes Testament 33 kaj *Ergänzungsheft* 33A). Listado de logografiaj valoroj estas trovebla en *A. Deimel, Sumerisches Lexikon, II. Teil*. Kompleta kaj aktuala listo de silabaj valoroj estas trovebla en *W. von Soden - W. Rölliĝ, Das akkadische Syllabar*.

Enkondukan bibliografion en akadaĵ studojn donas *Babylonisch-Assyrische Lesestücke* de R. Borger, 2. Aufl., Heft 1 p. IX-XI. La *Handbuch der Keilschriftliteratur* de la sama scienculo, I-III enhavas bibliografion de akada-sumeraj studoj ĝis 1974; ĝia uzo povas esti suplementa per la ĉiujara Keilschriftbibliographie en la ĵurnalo *Orientalia*.

Ĝeneralaj enkondukoj en la antikvajn studojn de la Proksima Oriento kaj en la civilizacion de Mezopotamio estas *W. Soden, Einführung in die Altorientalistik* kaj *A. Leo Oppenheim, Ancient Mesopotamia. Portrait of a Dead Civilization*, reviziita eldono kompletigita de Erica Reiner.

### § 3. Geografio kaj lingvo.

**a.** La akada estas unu de la gravaj kulturaj lingvoj de la monda historio. Dum periodo de kelkaj 2500 jaroj ĝi estis la medio de dominanta kulturo en la Antikva Proksima Oriento kaj abundaj skribaj atestoj en ĝi - religiaj, historiaj, literaturaj kaj gramatikaj - estis skribitaj kaj en modernaj tempoj trovitaj en ĝia kernolando kaj en aliaj regionoj tiel disvastigitaj kiel Egiptio, Sirio-Palestino, Anatolio kaj Persio. La centra geografia regiono de ĝia uzo estas la antikva Mezopotamio: ĉi tiu greka nomo origine rilatis al la regiono inter la riveroj Tigriso kaj Eŭfrato, sed nuntempe ĝi estas uzata en pli vasta senco por indiki regionon, kiu proksimume konformas kun la moderna Irako. En la dua kaj unua jarmiloj antaŭ nia erao ĉi tiu regiono estis dividita inter Asirio, en la nordo, kaj Babilonio, en la sudo; eĉ pli frue, en la tria jarmilo, ĝia suda parto ampleksis la urbostatojn de Sumerio kaj Akadio.

La plej fruaj skribitaj atestoj postlasitaj al ni el ĉi tiu regiono estas en la **sumera**, aglutina lingvo, kiu ne havas pruvebla parenceco kun iu alia konata lingvo, tamen fariĝis parto de la kultura heredo de la akadlingvanoj. La **akada** lingvo (aŭ lingvo de Akado) estas unue atestata en propraj nomoj menciitaj en sumeraj tekstoj de la periodo de Fara (ĉ. 2800 a.n.e.); ekde ĉ. 2500 a.n.e. ni trovas tekstojn komplete skribitajn en la akada.

**b.** La akada estas membro de la **semida** lingvofamilio, vere unu de ĝia plej frua kaj tutcerte ĝia plej bone atestita antikva membro. Tradicia klasifiko de la semidaj lingvoj baziĝas sur ilia geografia situo: la akada estas la nordorienta membro de la familio; la kanaanida (suba grupo, kiu inkluzivas la hebrean kaj la fenican, kaj, laŭ la opinio de kelkaj scienculoj, la ugaritan kaj eblaidan) kaj la arameaj dialektoj formas la nordokcidentan semidan branĉon; dume la araba, la antikva sudaraba kaj la etiopa formas la sudan branĉon.

**c.** Ekde ĝia unua atestado en la periodo de Fara, la akada estas atestita ĝis la unua jarcento n.e., kvankam en la lastaj jarcentoj de la antaŭkristana erao ĝi estis pli kaj pli anstataŭigita per la aramea kiel parolata lingvo kaj postvivis nur kiel tradicia sciencula lingvo. Dum la longa erao kaj en la vasta regiono de ĝia uzo la lingvo estis submetita nature al ŝanĝoj kaj fariĝis kutime distingi 'dialektojn' de la akada. La centraj dialektoj - la formoj de la lingvo trovitaj en la mezopotamia kernolando - komencas per la malnovakada (mnak.), la lingvo atestita en dokumentoj de la tria jarmilo; en la dua kaj unua jarmiloj ni trovas dialektan diferencigon inter suda (babilona) kaj norda (asiria) akada kaj inter diversaj periodoj (malnova, meza, nova kaj malfrua) ene de la babilona kaj asiria (mnb., mb., nb., mfb.; mna., ma., na.). Aldone al ĉi tiuj centraj parolitaj dialektoj ni trovas en uzo artefaritan "literaturan" formon de la lingvo kaj en Asirio kaj en Babilonio baziĝanta sur la mnb. dialekto;

ĉi tiu estas nomita "juna babilona" (jb). Ni povas sumigi la dialektan historion kaj indiki proksimumajn donitajojn:

mnak. 2500 - 1950	
mnb. 1950 - 1530	mna. 1950 - 1750
mb. 1530 - 1000	ma. 1500 - 1000
nb. 1000 - 625	na. 1000 - 600
mfb. 625 - 0	

Aldone al la centraj dialektoj diversaj "periferiaj dialektoj" de la dua jarmilo estas atestitaj; tiuj estas variaj skribitaj formoj de la akada influitaj per diversaj lokaj lingvoj (Susa, Boghazköy, Alalah, Nuzi, Ugarit kaj variaj lokaj tipoj en la tekstoj de Amarna).

**d.** La tekstoj postlasitaj en la akada estas diverstipaj: historiaj kaj kronografiaj tekstoj kaj raportoj pri popolnombado; kontraktoj kaj aliaj politikaj dokumentoj; negociaj kaj administraj atestoj; leĝaj kodoj; atestitaj kaj sigelitaj kontraktoj pri edziĝo, divorco, aĉeto kaj farmoj; personaj kaj stataj leteroj; rakonta poezio, kiu rerakontas mitojn, epoj kaj humuraj rakontetoj; amkantoj; ritualoj, preĝoj, himnoj, aŭguroj, raportoj pri profetaĵoj; scienculaj tekstoj pri lingvo, religio, historio, teknologio. Tiuj estas dissemitaj malegale tra la periodoj kaj dialektoj supre diskutitaj. Ĉar la babilona formo de la lingvo restis la normala medio de literaturaj kaj religiaj tekstoj, eĉ en Asirio, kaj ĉar la mnb. dialekto konservas en pli granda pureco karakterizaĵojn de la lingvo, kiuj perdiĝis pli malfrue, oni kutimas komenci la studadon de la akada per la mnb. kaj la sekvontaj paĝoj estos dediĉataj ĉefe al ĝi.

#### § 4. La skribsistemo

**a. Fizika formo de la signoj.** La plej multaj akadaĵaj tekstoj estis skribitaj per kana stiluso sur argila tabulo, kiu, post kiam la skribo estis enpremita, estis sunbakita aŭ fajrobakita por hardi ĝin; en pli malgranda amplekso aliaj materialoj (ŝtono, metaloj, vakso) estis ankaŭ uzitaj. La sistemo de la signoj estis hereditaj de la sumeranoj, kiu uzis ĝin por skribi sian propran lingvon. La plej malnovaj signoj en la sistemo ŝajnas esti imitaĵoj de argilaj markoj de diversaj formoj uzitaj kiel nombraĵoj en librotenada procedo tra la tuta Proksima Oriento ekde la 9-a jarmilo a.n.e. ĝis la 2-a; ĉiu tipo de nombraĵo supozeble reprezentis individuan tipon de varoj kaj tial unuopan vorton.

Al la grupo de signoj derivitaj de tiaj markoj estis aldonitaj aliaj, kiuj, en multaj kazoj almenaŭ, estis piktografiaj, t.e. figuris konkretajn objektojn. Fruaj sum. tekstoj (el Uruk, ĉ. 3000 a.n.e.) uzas serion da signoj, kies nombro estis iom post iom reduktita al tiuj reprezentataj en la klasikaj (malnovbabilonaj) signolistoj.

La formo de la signoj ankaŭ estis submetita al evoluo: fruaj dokumenteblaj ŝtupoj estis pli ofte ekkoneble piktografiaj kaj pli kurbliniaj en figuro, dume en pli malfruaj ŝtupoj la signoj estas simpligataj kaj ĉiu streko alprenas karakterizan kojnoforman aspekton, kiu diverĝas al du tradicioj, la babilona kaj asiria.



**b. Valoro de la signoj.** (1) Laŭcele, la signoj en ilia plej frua ŝtupo estis **logografiaj**, t.e. ili reprezentis unu aŭ pli multe specifajn vortojn. Pure logografia skribsistemo por si mem ne estas ligita al iu specifa lingvo: donita estu sekvenco de bildsignoj, kiu figuras TRI, ŜAFO, DONI, TEMPLO, donitan socian kuntekston oni povus "legi" (aldonante formalajn modifojn ne esprimatajn en la skribsistemo) en Esperanto "tri ŝafoj estis donitaj al la templo" aŭ en la franca "on a donné trois brebis au temple", same tia teksto povus esti legata en la sumera. Niaj plej fruaj tekstoj el Mezopotamio estas ankoraŭ plejparte aŭ tute en ĉi tiu ŝtupo kaj tial inklinaj por ĝiaj malavantaĝoj: ambiguecojn, kiujn sekvigas kaj la sennombra kvanto de signoj, kiuj estus necesaj por esprimi la parolatan lingvon adekvate.

(2) Iam ĉ. 3000 a.n.e. la sumeraj skribistoj kompletigis sian logografian sistemon enkondukante la **fonetikan** aŭ **silaban** uzon de signoj sen iu rilato al la vortsignifo de la silabo. Tiel la signo 𐎠𐎡(AN) ne estis pli longe limigata al esprimado de la sum. vorto *an* "ĉielo", sed povis ankaŭ reprezenti la sonon /an/, ekzemple en la verbo *ba-an-dù* "li konstruis<sup>1</sup>". Kiam akadaj skribistoj transprenis ĉi tiun skribsistemon por esprimi sian lingvon, ili heredis la du tipojn de valoro kaj ofte aldonis novajn fonetikajn valorojn surbaze de la akada: ĉar AN ankaŭ havis la sumeran valoron *dingir* "dio", ekvivalento al ak. *ilum* "dio" en ĝiaj variaj deklinaciaj formoj, nova fonetika valoro /il/ komencis esti uzata, ekz. por skribi *ilqe* "li prenis".

(3) La uzo de signoj kiel **determinativo** aŭ semantika klasifikilo estas speciala speco de logografia valoro: la determinativo estas logogramo, kiu antaŭiras aŭ sekvas vorton kaj identigas la klason, al kiu ĝi apartenas (homo, dio, urbo, planto ktp.); oni ne intencis prononci ĝin legante la tekston laŭte. Tiel skriba AN *Aŝŝur* rilatas al la dio Aŝŝur, dume URU (urbo) *Aŝŝur* rilatas al la homonima urbo.

(4) Signo kun fonetika valoro povas esti uzata kiel **fonetika komplemento**, t.e. esti aldonata al logogramo por specifi ĝian legadon. Tiel AN (sen tia komplemento) estu kutime legata DINGIR = *ilum* "dio"; AN-ú (kun -ú indikanta finan longan vokalon) estu legata kiel AN = *ŝamú* "ĉielo". Gramatikan informon donas la skribmanieroj *É-tum* (*bītum*) "domo" (nom.), sed *É-tim* (*bītīm*) (gen.).

**c. Alfabeto reprezento de akadaj signoj.** (1) Ni vidis, ke la fonetikaj (silabaj) valoroj de iu signo povas esti reprezentataj en alfabeto skribo: tiel AN havas la valorojn /an/ kaj /il/. Estas karakterize por la kojnoskriba sistemo (parte sekve de la naturo de la sumera lingvo), ke donita silabo en la akada povas esti reprezentata per unu de diferencaj signoj; por ke alfabetaj reprezentoj povu indiki, kiu signo estas aktuale uzata, modernaj scienculoj distingis homofoniajn signojn per indicaj nombroj, kiuj sekvas normigita listo kompilita de la franca scienculo François Thureau-Dangin (vidu la signolistojn menciitajn en § 2). Tiel la silabo /tu/ povas esti skribata per la signoj 𐎠𐎠 "tu unu", 𐎠𐎡 "tu du", 𐎠𐎡𐎠 "tu tri", ktp.; en alfabeto reprezento la unua de tiuj restas nemarkita, la valoroj "du" kaj "tri" estas indikataj per la akcentoj akuto kaj gravo kaj pliaj valoroj per

<sup>1</sup> La signifo de akcentoj kaj numeraj indicoj estos malsupre klarigata, § 4c; pri akadaj fonemoj kaj ilia prononcado vidu § 82a kaj b.

subnotita nombro: *tu, tú, tù, tu<sub>4</sub>, tu<sub>5</sub>*, ktp. (Noto  $tu_x$  indikas valoron /tu/ asignata al signo, kiu, tamen, ankoraŭ ne estas listigita en la modernaj signolistoj.) Tiaj akcentoj aŭ nombroj ne havas fonetikan signifon.

(2) **Logografiaj** valoroj povas esti simile indikataj en alfabeto formo. Konvencie logogramoj uzataj en akada teksto estas indikataj per la sum. vorto en majuskloj, kaj homofonoj same estas diferencigataj per indicoj: LUGAL "reĝo", LÚ "viro", KU<sub>6</sub> "fiŝo".

(3) Determinativoj estas konvene reprezentataj en suprenotita pozicio kaj oni uzas ilian sum. formon: URU *Aššur* kaj AN (t.e. DINGIR, la sum. varianta de legado de la signo AN en la senco "dio") *Aššur* estas reprezentata: <sup>uru</sup>Aššur, <sup>d</sup>Aššur (<sup>d</sup> estas mallongigo derivita de la latina *deus* "dio").

(4) **Fonetikaj komplementoj** estas normale aldonataj al logogramoj en sum. formo (*Ē-tum*) aŭ skribataj en suprenotita pozicio aŭ krampoj malantaŭ akada vorto: *bītum<sup>tum</sup>*, *bītum(tum)*.

(5) Depende de la celo, al kiu ili servu, akadaĵoj skribitaj en kojnoskribaj signoj povas esti reprezentataj alfabeto diversmaniere:

(i) La teksto povas esti reprezentata kiel skribita indikante signojn unu post la alia kaj separante ilin per streketo (se ili apartenas al la sama vorto) aŭ spaco (en malsamaj vortoj) aŭ per la pozicio (determinativoj kaj kelkfoje fonetikaj komplementoj estas suprenotataj). Tie: LUGAL <sup>giš</sup>IG DÙ-uš aŭ *šar-ru-um da-al-tam i-pu-uš* (ĉi tiuj estas du de la multaj eblaj signosekvencoj, kiu povas esti uzataj por skribi la akadan frazon *šarrum daltam ĩpuš* "la reĝo faris pordon"). Signopostsigna reprezentado nomiĝas **transliterado**; ĝi ne montras aŭ montras nur hazarde la precizan lingvistikan formon parolita en la akada.

(ii) La teksto povas esti reprezentata kiel parolata ignorante la skriba realigo de la teksto kaj donante la rekonstruita lingvistika formo: *šarrum daltam ĩpuš*. Tia reprezentado nomiĝas **normaligo** aŭ **transkribado**.

(iii) **Miksita** reprezentado uzanta signopostsignan transliteradon, al kiu transkribado de ĉiu logogramo estas aldonata, estas ofte uzata, ekz.: *šar-ru-um <sup>giš</sup>daltam(IG) ĩpuš(DÙ-uš)*. Tia sistemo donas plenan indikon de uzataj signoj kaj partan indikon de lingvistikaj formoj.

**d.** Ĉefa karakterizaĵo de la skribsistemo estas, ke ĉiu signo povas esti **multvalenta**: ĝi povas reprezenti diferencajn valorojn, same kiel unuopa alfabeto simbolo povas reprezenti multnombrojn da fonetikaj realigoj en la skriba angla. La leganto de la akada devas fidi je kuntekstaj indikoj, kiuj sciigas lin, ĉu li legu AN kiel logogramon "ĉielo" aŭ "dio" aŭ kiel fonetikan signon indikantan la sonon /an/ aŭ /il/. Normale ĉi tiuj indikoj sufiĉas; tre malofte ili permesas pli multe ol unu varianton de legado kaj lasas la tekston do ambigua.

#### **e. Pliaj rimarkigoj pri la legado kaj transkribado de la akada. .**

(1) La fonetikaj valoroj de signoj estas ĝenerale de la tipo de KV (konsonanto + vokalo), VK aŭ KVK: *ba, ab, bab*. La skribado *ba-ab* ne indikas longan vokalon aŭ du vokalojn, sed la silabon /bab/.

(2) La plej multaj signoj, kiuj enhavas la vokalon *e* aŭ *i*, estas nedeterminaj kaj povas reprezenti ĉiun de tiuj ĉi vokaloj; tio estas ĝenerale ĝusta por signoj de la tipo KVK, kiuj enhavas *e/i* (vidu §15). La elekto de la varianta baziĝas sur motivoj sendependaj de la skribo mem;

tiel PI-*tu-ú* "ili estas malfermaj" devas esti legata, pro gramatikaj motivoj, *pe-tu-ú*, ne *\*pi-tu-ú*.

...(3) En la kojnoskribo vokalsigno, kiu ripetas la vokalon de KV-tipa signo (*tu-ú*) povas esti uzata por indiki vokalan longecon; vokala longeco estas regule tiel indikata nur en la kazo de longa akcentata fina vokalo, kiu rezultas el kuntiriĝo (§84e): *pe-tu-ú* = *petû* < *\*patihû*.

...(4) En normaligoj vokala longeco **devas** esti indikata; du grafikaj indikoj de vokala longeco estas normale uzata: se la longeco estas (i) morfologia (ekz. *ā* de la participa formo *pārisum*) aŭ (ii) la rezulto de konsonanta perdiĝo (*\*hit'um* > *hītum* "peko", §84d) ĝi estas indikata per **superstreko** (˘); se ĝi estas (iii) la rezulto de vokala kuntiriĝo (*rabium* > *rabûm* "granda", §84e) ĝi estas indikata per **ĉirkumflekso** (^).

**Silaba** longeco estu diferencigata disde vokala longeco: silabo estas nomata mallonga se ĝi konsistas el konsonanto kaj mallonga vokalo (la unua silabo de *halāqum*, la dua de *pārisum*); ĝi estas nomata longa se ĝi enhavas longan vokalon aŭ se ĝi finiĝas per konsonanto (la dua kaj la lasta silaboj de *pārisum*, ambaŭ silaboj de **dākum**).

(5) Duoblaj konsonantoj estas kutime, sed ne ĉiam, indikataj en la mnb. skribo: "li pesas" povas esti skribata *i-ša-qal* aŭ *i-ša-aq-qal*, sed en ĉiu kaza ĝi estas normaligata *išaqal*.

(6) Komenca ' (alef, vidu §82b) normale ne estas indikata en la skribo kaj ĝia neapero en la skribsistemo supozeble indikas ĝian malaperon en la parolo; en la mnb., tamen, vortkomenca skribado *i-il*, *a-ad* ktp. aperas por indiki la historian ekziston de alef kaj ne la longecon: *illak* (< *\*ji'allak*), skr. *i-il-la-ak*; *ul* (*\*ul*), skr. *ú-ul*.

(7) La signoj *a-a* ne indikas /a/ aŭ /a'a/ sed /aj/ aŭ /aj(j)V/, kie V = iu vokalo. Ĝenerale la signoj uzataj por reprezenti /'/, /j/, /w/ formas subsistemon kun specialaj karakterizaĵoj; la signoj WA, 'A kaj IA, ekzemple, malkutimas reprezenti iun vokalon (WA = /wa/, /we/, /wi/, /wu/ ktp.) esti parte inversigeblaj (WA = /aw/, 'A = /a'/ ktp.) kaj esti parte interŝanĝeblaj (WA = /ja/, IA = /i'a/ ktp.).

(8) La sekvaj normoj por vortakcentado estas fideinde derivitaj de nereкта evidenteco: 1. vortoj dusilabaj estas akcentataj sur la unua (*ábum*); 2. vortoj tri-aŭ plursilabaj estas akcentataj sur la antaŭlasta silabo se ĉi tiu estas longa (*bikítum*, *abúllum*, *epíštum*, kp. 4 supre), alikaze 3. sur la trialasta silabo (*mupárrisum*). Esceptoj: vortakcento falas sur longan finan vokalon, kiu rezultis el kuntiriĝo (*rubûm*) kaj sur radiksilabon de meze malfortaj verboj (*ukīn*).

(9) La transliterita akada estas kutime presata latinlitere. Latinaj majuskloj aŭ majuskletoj kutimas indiki logogramojn (sumerogramojn) kaj signojn, kies legado estas malcerta aŭ nespecifita.

La signo + kutimas indiki kunmetaĵon de du simplaj signoj en unu pli kompleksa: tiel la signo  $\text{𐎠𐎠𐎠}$  estas kunmetita el IGI + DIB  $\text{𐎠𐎠} + \text{𐎠}$ .

La multiplika signo × indikas signon enskribitan en alian: tiel KA × ME  $\text{𐎠𐎠}$  indikas KA kun ME skribita en ĝi  $\text{𐎠𐎠} \times \text{𐎠}$ .

x = nelegebla signo aŭ unu de nekonata legado.

[ ] inkluzivas rompitan parton de la teksto.

< > inkluzivas ion, kion oni opinias erare ellasita de la antikva skribisto.

{ } aŭ " " inkluzivas ion, kion oni opinias erare aldonita de la antikva skribisto.

## LECIONO 1

### NOMA DEKLINACIO, I: REKTA STATO

§ 5. Nomoj estas deklinaciataj per tri formoj: nominativo, genitivo kaj akuzativo (pri ilia funkcio vidu § 9); la "oblikva" kazo havas ununuran formon kun kaj genitiva kaj akuzativa funkcio. La rekta stato rilatas al la normalaj nomaj formacioj ne sekvataj per genitivo; pri aliaj "statoj" vidu § 16.

§ 6. **Formoj.** En la rekta stato la sekvontaj finaĵoj alpendiĝas al la noma stamo<sup>1</sup> (ekz. la stamo \**šarr-*, kiu rezultigas *šarrum* "reĝo", *šarratum* "reĝino"); klarigo de formoj kaj terminologio sekvos en §§ 7-10:

	Virgenra	Ingenra
Sing. nom.	-um	-(a)t-um
gen.	-im	-(a)t-im
akuz.	-am	-(a)t-am
Du. nom.	-ān	-(a)t-an
obl.	-īn	-(a)t-in
Plur. nom.	-ū (aŭ -ānū)-āt-um	
gen.	-ī (aŭ -ānī)	-āt-im

La adjektivo (ekz. la stamo \**dann-*, kiu rezultigas virg. *dannum*, ing. *dannatum* "forta") havas la samajn finaĵojn en la sing. kaj en ing. plur.; en la virg. plur. la adjektivaj finaĵoj estas -*ūtum* (nom.), -*ūtīm* (oblikva kazo). En mnb. la adjektivo ne havas dualon: adjektivo modifanta dualan substantivon staras en la pluralo.

§ 7. **Genro.** Estas du genroj, virgenro kaj ingenro. Ĝenerale, la ingenro estas markata per -*t* aŭ -*at* sufiksata al la stamo, kaj nomoj sen ĉi tiu sufikso estas virgenraj. La pli mallonga formo de la sufikso (-*t*) estas pli ofte uzata (ekz. *mārum* "filo", *martum* "filino"). La pli longa formo (-*at*) estas uzata kun duoblaj radikoj (t.e. radikoj, kies dua kaj tria radikalo estas identaj, ekz. \**dnn* en *dannum* "potenca") kaj kun la noma formo *pars*<sup>2</sup>) (*kalb-at-um*) "hundino"; vidu § 65). (Nomoj de la formo *pirs* kaj *purs* aldonas -*t*, sed la stamo alprenas la sekundaran figuron *piris*, *purus*; kp. *riḥištum* kaj *puluḥtum*, § 12)

§ 8. **Nombro.** Estas apartaj formoj por singularo, pluralo kaj dualo. La dualo ne estas pli longe formo libere uzata en la mnb., sed limigata al

<sup>1</sup> Per "radiko" estas esprimata la fundamenta strukturo komuna al parencaj vortoj: \**dmq* estas la radiko de *dumqum*, *damqum* kaj *udammiq*, *kūn* de *kīnum* kaj *ikān*, *ab* de *abum* kaj *abbū*. Per "stamo" estas esprimata (1) la baza formo de donita substantivo aŭ adjektivo, al kiu afiksoj estas aldonataj: *dumq-*, *damq-*, *ab-*, *kīn-*; (2) verba konjugacio, vidu § 22.

<sup>2</sup> La radiko \**prs* estas uzata kiel modela indiko de formoj: tiel la formo *pirs* de \**špr* estas la noma stamo *šipr-* aŭ la kompletan formon *šiprum*; ĝia formo *pāris* estas *šāpir-* aŭ *šāpirum*.

substantivoj, kiuj signas aŭ kunsignas partojn de la korpo: *īnān* "du okuloj", *šēpān* "du piedoj": en pli vasta senco: *rīšān* "pinto" (de *rīšum* "kapo"), *emūqān* "forteco (de brakoj)". Pri adjektivoj, kiuj modifas dualojn, vidu § 6 supre.

**§ 9. Kazfunkcioj.** La nominativo estas uzata kiel subjekto de verbo aŭ predikato de noma propozicio. La genitivo estas uzata malantaŭ prepozicio aŭ rilate al alia substantivo (indikante posedon, aganton, objekton de ago). La akuzativo estas uzata kiel objekto de verbo aŭ en adverbaj uzoj (indikante tempon, lokon, specifikon).

### § 10. Pliaj notoj.

1. La virg. plur. finaĵoj *-ānū*, *-ānī* aperas en la malfrua mnb. en malgranda nombro de mallongaj vortoj (precipe *ilum* "dio" kaj *ālum* "urbo") kaj plivastiĝas poste.

2. En la ing. *-et* kaj *-ēt* estas kondiĉitaj variantoj de *-at* kaj *-āt*, se la nomo havas *e < a*: vidu § 84f kaj g. Tiel *bēltum* "sinjorino" (stamo *\*ba'l*) havas mnb. plur. *bēlētum* (as. *bēlātum*); tiel ankaŭ *erretum* "malbeno" (*\*'rr*), plur. *errētum*; *ezzum* "ĉagrena" (*\*'zz*), ing. *ezzetum*.

3. Mimacio (aldono de *m* al la kazindikiloj *u*, *i*, *a*) estas karakteriza por virg. sing. substantivoj, ĉiuj ing. substantivoj kun escepto de dualoj kaj ĉiuj adjektivoj. Nunacio (aldono de *n* al la kazindikiloj *a*, *i*) estas karakteriza por la dualo. Post la mnb. periodo kaj mimacio kaj nunacio nekutimiĝis: *šarrum* > *šarru*, *īnān* > *inā*.

4. Ne estas difina aŭ nedifina artikolo; *šarrum* povas esti tradukata per "reĝo" aŭ "la reĝo", kiel la kunteksto necesigas.

5. Post la mnb. periodo la kaza sistemo estis submetata al simpliĝo analoga al tiu de la malfrua latina. Tiurilate ĉiu dialekto devas esti studata en si mem.

6. Kelkaj ingenraj substantivoj malhavas la finaĵon *-(a)t*: *umum* "patrino". Kelkaj substantivoj, kiuj malhavas ingenran indikilon en la sing. havas ĝin en la plur.: *abullum* "urba pordego" (ing.), plur. *abullātum* (ing.); *eqlum* "kampejo" (virg.), plur. *eqlētum* (ing.).

7. Krom la tri kazoj supre listigitaj, estas du pliaj adverbaj kazoj, kiuj estas kun relativa rareco, escepte en la mnb. kaj jb. poezioj: la lokativo, kun la finaĵo *-um* "en, ĉe", kaj la terminativo, kun la finaĵo *-iŝ* "al": *qātukka* < *\*qātum-ka* "en via mano", *puḥruššunu* < *\*puḥrum-šunu* "en ilia kunveno", *šēpū'a* < *šēpu'a* < *\*šēpum-ja* "ĉe miaj piedoj" (§ 84d), *qerbum Bābilim* "en (la mezo de) Babilono", *dāriŝ ūmī* "por ĉiam" (por la longeco de tagoj). Adjektiva stamo + *-iŝ* havas adverban sencon: *kīniŝ* "firme". Post 1300 a.n.e. substantivo + *-iŝ* ricevis komparan sencon: *abūbiŝ* "kiel fluso", *labbiŝ* "kiel leono".

**§ 11. Nomoj kun vokalaj stamoj.** Kun la malapero de '1-7 (§ 82j; ' en ĉi tiu kunteksto markas silablimon, ĉu historia '1-5 aŭ *w* aŭ *j*) en substantivoj kaj adjektivoj kiel *rabi'um* "granda", *rubā'um* "princo", *šumlu'um* "plenigi", kuntiriĝo kutime okazas laŭ la reguloj notitaj en § 84e: *rabi'um* > *rabium* > *rabûm*, *rubā'im* > *rubāim* > *rubêm*, *rabi'am* restas la normala mnb. formo, sed pli malfrue > *rabâm*. En la ing. sing. la

vokalo antaŭiranta ' estas longigata (§ 84d): *rabītum* < *\*rabi'tum*,  
*šurbūtum* < *\*šurbu'tum*.

s. v. nom.	<i>rabi'um</i> >	<i>rabûm</i>	<i>rubā'um</i> >	<i>rubûm</i>	<i>sumlûm</i>
gen.	<i>rabi'im</i> >	<i>rabīm</i>	<i>rubā'im</i> >	<i>rubêm</i>	<i>sumlīm</i>
akuz.	<i>rabi'am</i> >	<i>rabâm</i>	<i>rubā'am</i> >	<i>rubâm</i>	<i>sumlâm</i>
i. nom.	<i>rabītum</i>				
pl. v. nom.	<i>rabi'ūtum</i> >	<i>rabūtum</i>	<i>rubā'û</i> >	<i>rubû</i>	
obl.	<i>rabi'ūtim</i> >	<i>rabūtim</i>	<i>rubā'ī</i> >	<i>rubê</i>	
i. nom.	<i>rabi'ātum</i> >	<i>rabātum</i>			

**§ 12. Tipaj variacioj** en la formo inter virg. kaj ing. aŭ inter ing. sing. kaj plur. estas pro tiaj faktoroj kiel vokalperdiĝo, vokalenmeto kaj konsonanta asimilado:

*\*damiq-um* > *damqum* "bona", i. *damiqtum*, v. pl. *damqūtum*, i. pl. *damqātum* (vokala elizio en v. kaj i. pl.: § 84b)

*\*pulḥ-tum* > *puluḥtum* "timo", pl. *pulḥātum*; *\*riḥṣ-tum* > *riḥiṣtum* "inundo", pl. *riḥṣātum* (simpliĝo de triobla konsonanto en sing. per vokalenmeto: § 83n)

*\*šan-tum* > *šattum* "jaro", pl. *šanātum* (asimilado de *n* en sing.: § 83e)

*\*libn-tum* > *libittum* "briko", pl. *libnātum* (vokalenmeto; asimilado de *n*).

**§ 13.** *aḥum* "frato" kaj *abum* "patro" formas la pluralon kun konsonanta reduobliĝo: *aḥḥū*, *abbū*.

**§ 14. La adjektivo** normale sekvas la substantivon, kiun ĝi modifas.

La adjektivo povas servi kiel substantivo; tiukaze ĝi normale konservas la adjektivan deklinacion (kun virg. plur. *-ūtum*), sed atentu *šibum* "griza, grizharulo, atestanto" kun duobla pluralo *šibū* "atestantoj" kaj *šibūtum* "plejaĝuloj".

Substantiva konstruado en la akada povas kelkfoje esti tradukata per adjektiva frazo: *zēr šarrūtīm* (laŭvorte "semo de reĝeco") "reĝa idaro".

**§15. Pri la lernado de kojnoskribaj signoj.** Notu, ke finaj konsonantoj en signovaloro estas nedeterminaj, la sama signo reprezentas voĉajn (*b*, *g*, *d*, *z*), senvoĉajn (*p*, *k*, *t*, *s*) kaj emfazajn konsonantojn (*q*, *ṭ*, *ṣ*) de la sama loko de artikulado; tiel *ad*, *at* kaj *aṭ* ĉiuj estas esprimataj per la sama signo *AD*; ĝia valoro povas esti reprezentata plej ekonomie en signolistoj kiel *ad*, reprezentante la tri eblecojn *ad/t/ṭ*. Simile la signo *IG* povas esti realigata kiel *ig/k/q*, *IB* kiel *ib/p*, *UZ* kiel *uz/s/ṣ* ktp. Komencaj konsonantoj en signovaloro estas pli klare diferencigataj en la skribo, sed en la mnb. ekstraj signoj por la emfazaj konsonantoj estas ankoraŭ ne en ĝenerala uzo; ĉi tiuj estas kutime reprezentataj per signoj , kiuj indikas primare la voĉan aŭ senvoĉan homorganan konsonanton. Tiel komenca *q* estas indikata per GA (legota *qá*) kaj KI (legu *qî*), *ṭ* per TU (*ṭú*), *ṣ* per ZU (*ṣú*) aŭ per SU.

Ni vidis (§ 4e, 2), ke la plej multaj signoj, kiuj enhavas *i* povas ankaŭ esti legataj kun *e*: tiel DI povas esti legata *di* aŭ *de*, kaj simile LI, GI ktp. Estas











kelkaj esceptoj: *bi* kaj *be* estas diferencaj signoj, kiel *ti* kaj *te*, *ni* kaj *ne*, *ŝi* kaj *ŝe*.

### Vokablaro

<i>ana</i> (prep.): al	<i>kīma</i> (prep.): kiel; (konj.): kiam, ke
<i>arnum</i> : peko, krimo; pun(ad)o	<i>maḥrum</i> : fronto, antaŭa flanko
<i>ašrum</i> : loko	<i>maršum</i> , i. <i>maruštum</i> (<
<i>aššum</i> (prep.): pro; (konj.): ĉar	<i>maruštum</i> ): malsana, malfacila
<i>awīlum</i> : homo, (libera) viro	<i>nišū</i> (i. pl.): homoj
<i>bītum</i> (v.), pl. <i>bītātum</i> (i.): domo	<i>pušqum</i> : malfacileco
<i>dannum</i> , i. <i>dannatum</i> : forta, potenca	<i>rabûm</i> < <i>rabium</i> , i. <i>rabītum</i> : granda
<i>erretum</i> , pl. <i>errētum</i> : sakraĵo, malbeno	<i>rīmum</i> : sovaĝa taŭro
<i>ezzum</i> , i. <i>ezzetum</i> : ĉagrena	<i>sapḥum</i> , i. <i>sapiḥtum</i> : disĵetita
<i>gitmālum</i> : perfekta, nobela	<i>šanûm</i> < <i>šanium</i> , i. <i>šanītum</i> : dua, alia
<i>ilum</i> , pl. <i>ilū</i> aŭ <i>ilānū</i> : dio	<i>šarrum</i> : reĝo
<i>ina</i> (prep.): en, inter, el, ene de, per	<i>tamḥārum</i> : batalo
<i>išātum</i> (i.), pl. <i>išātātum</i> : fajro	<i>ummum</i> (i.): patrino
<i>ištu</i> (prep.): el, de	<i>wardum</i> : sklavo, servisto
<i>kabtum</i> , i. <i>kabittum</i> : peza, adorata, grava (persono)	<i>waštum</i> : malfacila
<i>kadrum</i> : sovaĝa, furioza, senbrida	<i>zīkarum</i> aŭ <i>zīkrum</i> (§ 84b): viro, masklo)

### Kojnoskribaj signoj

(La unua kolumno montras la signon en ĝia novasiria formo; la dua montras la ĝeneralajn fonetikajn valorojn, kun postmnb. valoroj en krampoj; la lasta kolumno montras la logografiajn valorojn.)

signo	fonetika	logografia
	an	AN = <i>Anum</i> "la dio Anum" AN = <i>šamû</i> "ĉielo" DINGIR = <i>ilum</i> "dio"
	na	
	um	
	i	
	(bid)	É = <i>bītum</i> "domo" É.GAL = <i>ekallum</i> "palaco"
	ra	
	gal, (qal)	GAL = <i>rabûm</i> "granda"
	bu, pu, (gíd, qíd, sír, šír)	GÍD(.DA) = <i>arkum</i> "longa"
	meŝ	MEŠ (signo de pluraleco) <sup>3</sup>
	a	A (.MEŠ) = <i>mû</i> "akvo" (plur.)

<sup>3</sup> Pluraleco povas ankaŭ esti indikata per duobligo de la logogramo por substantivo aŭ adjektivo: tiel DINGIR.MEŠ, DINGIR.DINGIR kaj DINGIR.GAL.GAL ĉiuj indikas *ilū* "dioj" (kun *rabūtum* "grandaj" aldonita en la lasta frazo).



## Ekzerco

1. Deklinaciu *šarrum, šarratum, erretum, dannum, ezzum, rubā'um, šanûm.*

2. Normaligu (kp. § 4c,5) kaj traduku: *a-wi-lam. wa-ar-dim. ni-ši sa6-ap-ḥa-tim. ar-nam kab-tam. šar-ru-um gi-it-ma-lum. pu-uš-qí wa-aš-ṭú-tim. i-na šar-rí. Anum ra-bu-um. aš-šum er-re-tim. ilū rabûtum. ummum ra-bítum. i-na tam-ḥa-ri-im. ki-ma i-ša-tim ez-ze-tim. er-re-tam ma-ru-uš-tam. ri-mu-um ka-ad-ru-um. šarrum da-núm. aš-šum zi-ka-ri-im ša-ni-im. a-na bīt ša-ni-im. iš-tu bītim. i-na ma-aḥ-ri-im.*

3. Traduku en la akadan: potencaj reĝoj. grandaj viroj. la adorata dio. ĉagrenaj dioj. alies domo. en la fajro. el la batalo. kiel sklavo.

4. Kojnoskribe:

𒀭 𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭𒀭 ; 𒀭𒀭 𒀭𒀭 ;  
 𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 ; 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 ;  
 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭𒀭 ; 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 ;  
 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭 ; 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 ; 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭 𒀭𒀭𒀭

## LECIONO 2

### NOMA DEKLINACIO; II: ABSOLUTA KAJ KONSTRUITA STATO. PRONOMAJ SUFIKSOJ

**§ 16. Nomaj statoj.** Aldone al la rekta stato traktita en leciono 1, la akada nomo aperas en du aliaj "statoj": la absoluta stato (latine: status absolutus) kaj en la konstruita stato (latine: status constructus). La lasta estas trovebla en ĉiuj semidaj lingvoj, la unua nur en la akada kaj (kun diferenca funkcio) en la arameaj dialektoj.

**§ 17. Absoluta stato.** Tiu estas laŭforme karakterizata per la perdiĝo de kazfinaĵoj: *zika* < *zika*rum, *ŝarrat* < *ŝarrat*um, *sinniŝ* (kun perdiĝo de i. -t) < *sinniŝ*tum. Ĝi aperas kun relativa rareco kaj funkcias ĉefe en numeraloj kaj mezuroj de longeco, pezo ktp., kiu akompanas ilin (ĉi tiuj estos diskutataj en § 76) kaj en rigidiĝintaj adverbaj kaj ĉenomaj esprimoj: *ŝar lā ŝanān* "nekomparebla reĝo", *ana dār* "por ĉiam", *zika* u *sinniŝ* "viro kaj virino", *ŝeher* u *rabi* "juna kaj maljuna".

**§ 18.** La **konstruita stato** estas la neakcentata formo de la nomo, kiu rekte antaŭiras alian nomon en la genitivo (*bēl bītim* "dommastro") aŭ verban propozicion en la subjunktivo (*awāt iqbū* "la vorto, (kiun) li diris", § 37); la noma formo, kiu antaŭiras pronoman sufikson estas simila (*bēl-ŝu* "lia mastro"), kaj estos ankaŭ diskutata ĉi tie.

Ĝenerale oni povas diri, ke la nomo en konstruita pozicio alprenas la plej mallongan formon, kiu estas fonetike ebla. Tie, kie (laŭ la normo de § 83n) fonetika adaptado estas necesa por eviti finan dukonsonantecon, la specifa adaptado, kiu estas uzata, dependas de la origino de la vorto: ni devas diferencigi ekz. formon *pars* (*pirs*, *purs*) kiel *maḥrum* (*ŝiprum*, *ŝulmum*) disde formo *paris* kiel *ŝaknum* < *ŝakinum* (kp. § 84b) kaj disde ingenroj kiel *ŝubtum*, formitaj sur bazo *ŝub-* < \**wšb* + ing. -t-. Jen skema superrigardo de la formoj normalaj en mnb., pri traduko vidu la vokablarojn.

#### 1. Grupo kun diferencaj formoj antaŭ genitivo kaj sufikso:

##### i. Antaŭ genitivo:

- a. mimacio, nunacio kaj mallongaj kazfinaĵoj perdiĝas: *bēl bītim*, *ana bēl bītim*, *aŝŝat awīlim*; longaj kazfinaĵoj restas: *bēlū bītim*, *bēlī bītim*
- b. sed dukonsonantaj stamoj (kiel *ab-* "patro" < \**ab-*) ĝenerale aldonas -i por ĉiuj kazoj: *abi bītim*, *idi awīlim*
- c. multsilabaj ingenraj stamoj per -t- kaj unusilabaj stamoj, kiuj finiĝas per duobliginta konsonanto aldonas -i por ĉiuj kazoj (kp. § 83n); *nidinti awīlim*, *ṭuppi awīlim*, *libbi awīlim*, *ummi ŝarrim*; kun escepto de la unusilaba stamo *ŝarr-*, kiu simpliĝas al *ŝar*: *ŝar mātīm*
- d. dusilabaj virgenraj stamoj finiĝantaj per duobla konsonanto simpligas ĝin: *kunuk awīlim*
- e. stamoj finiĝantaj per vokalo povas sekvi regulon kiel supre (*rabi bītim*, *kala mātīm*), sed la fina vokalo povas perdiĝi (*rab bītim*, *kal mātīm*), kaj -a

povas esti anstataŭigata per *-i* (*kali*); longa *-ā* estas kutime anstataŭigata per la genitiva finaĵo *-ê* < *-ā -i*, kp. § 84e (*rubā'um*, konstr. *rubê*).

## ii. Antaŭ sufikso (alia ol *-ī*):

- mimacio, nunacio kaj mallongaj kazfinaĵoj en sing. nom./akuz. perdiĝas: *bēlšu*, *māssu* (< *\*māt-šu*, § 83f), sed *mātātušu*, *īnāšu*
- mallongaj kazfinaĵoj restas (kaj sekundare longigataj: § 84i) en gen. sing. kaj en ing. plur.: *ana bēlišu*, *mātātušu*, *ana mātātišu*
- multsilabaj ing. stamoj per *-t-* kaj stamoj, kiuj finiĝas per duobliginta konsonanto aldonas *-a* por nom./akuz. sing.: *nidintašu*, *ṭuppašu*, *libbaki*, *kunukkašu*, *ummašunu*, *šarrašu*
- dukonsonantaj stamoj (*abum*, *idum*), stamoj de radikoj kun malforta tria konsonanto (*mārum* < *\*mar'um*, *bīšum* < *\*bišjum*) kaj vokalaj stamoj per *-a* (*kalûm* < *\*kala-um*) ĝenerale konservas kazfinaĵojn tra la tuta sing.: *abušu*, *abišu*, *abašu*, *bīšušu*, *mārušu*, *kalûšu* < *\*kala-u-šu*, *rubûšu* (sed la *i*-stamo *bānium* formas *bānišu* kiel supre).

## 2. Grupo kun unuopa formo antaŭ genitivo kaj sufikso (escepte *-ī*):

- pars*, *pirs*, *purs* (*maħr-*, *šipr-*, *šulm-*) ripetas sian unuan vokalon: *maħar awīlim*, *šipiršu*, *šulumkunu*
- formoj kiel *šaknum* < *\*šakinum*, kiu rezultas el vokalelizio (§ 84b) restaŭras la perdiĝintan vokalon: *šakin mātīm*, *šakinšu*
- fina *-t* de unusilabaj ing. stamoj (*šub-t-um*) estas kutime anstataŭigata per *-at* (*šubat awīlim*, *šubassu*), sed kelkfoje helpa vokalo (1,i,c kaj 1,ii,c supre) estas aplikata (*qīšti awīlim*, *qīštaka*).

3. La supraj reguloj resumas la formojn trovitajn en la mnb., sed oni notu, ke en aliaj dialektoj, kaj kelkfoje eĉ en la mnb., la traktado povas diferenci: kio restas konstanta, tio estas la evito de duobla fina konsonanteco kaj la tendenco longigi vortojn, kiu estas pli mallonga ol kutime, sed la uzitaj rimedoj povas ŝanĝiĝi.

## 4. Resumo de formoj (kp. § 84i pri sekundara longeco):

(i) Plej simpla tipo:

		kun genitivo			kun sufikso		
		nom.	akuz.	gen.	nom.	akuz.	gen.
<i>bēlum</i>	sing.	<i>bēl ālim</i>			<i>bēl-ī</i> <i>bēl-šu</i>	<i>bēli-ja</i> <i>bēli-šu</i>	
	plur.	<i>bēlū ālim</i>	<i>bēlī ālim</i>	<i>bēl-ū'a</i> <i>bēl-ū-šu</i>	<i>bēlī-ja</i> <i>bēlī-šu</i>		
<i>aššatum</i>	sing.	<i>aššat awīlim</i>			<i>aššat-ī</i> <i>aššassu</i>	<i>aššati-ja</i> <i>aššati-šu</i>	
	plur.	<i>aššāt awīlim</i>			<i>aššātu-ʼa</i> <i>aššātu-šu</i>	<i>aššāti-ja</i> <i>aššāti-šu</i>	

(ii) Specialaj tipoj:

<i>libbum</i>	<i>libbi awīlim</i>	<i>libb-ī</i> <i>libbašu</i>	<i>libbi-ja</i> <i>libbišu</i>
<i>kunukkum</i>	<i>kunuk awīlim</i>	<i>kunukk-ī</i> <i>kunukka-šu</i>	<i>kunukki-ja</i> <i>kunukki-šu</i>
<i>maḥrum</i>	<i>maḥar awīlim</i>	<i>maḥr-ī</i> <i>maḥar-šu</i>	<i>maḥri-ja</i> <i>maḥri-šu</i>
<i>šiprum</i>	<i>šipir awīlim</i>	<i>šipr-ī</i> <i>šipir-šu</i>	<i>šipri-ja</i> <i>šipri-šu</i>
<i>šulmum</i>	<i>šulum awīlim</i>	<i>šulm-ī</i> <i>šulum-šu</i>	<i>šulmi-ja</i> <i>šulmi-šu</i>
<i>šaknum</i> < * <i>šakinum</i>	<i>šakin mātīm</i>	<i>šakn-ī</i> <i>šakin-šu</i>	<i>šakni-ja</i> <i>šakni-šu</i>
<i>šubtum</i>	<i>šubat awīlim</i>	<i>šubt-ī</i> <i>šubassu</i>	<i>šubti-ja</i> <i>šubti-šu</i>
<i>qīštum</i>	<i>qīšti awīlim</i>	<i>qīšt-ī</i> <i>qīšta-šu</i>	<i>qīšti-ja</i> <i>qīšti-šu</i>
<i>nidintum</i>	<i>nidinti awīlim</i>	<i>nidint-ī</i> <i>nidinta-šu</i>	<i>nidintija</i> <i>nidinti-šu</i>

	kun genitivo			kun sufikso		
	nom.	akuz.	gen.	nom.	akuz.	gen.
<i>bānûm</i> < <i>bānium</i>	<i>bāni/bān awīlim</i>			<i>bānî</i> < * <i>bāni-ī</i>		<i>bānîja</i> <i>bānîšu</i>
<i>bānītum</i>	<i>bāniat awīlim</i>			<i>bānītī</i> <i>bānīssu</i>		<i>bānītija</i> <i>bānītīšu</i>
<i>kalûm</i> < * <i>kala'um</i>	<i>kala (kali, kal) mātīm</i>			* <i>kalî</i> < * <i>kala-ī</i>	<i>kalûšu</i> <i>kalâšu</i>	<i>kalîja</i> <i>kalîšu</i>
<i>rubûm</i> < * <i>rubā'um</i>	<i>rubê ālim</i> < * <i>rubā-i</i> <i>gen.</i>			<i>rubê</i> <i>rubûšu</i>	<i>rubâšu</i>	<i>rubêja</i> <i>rubêšu</i>
<i>abum</i>	<i>abi awīlim</i>			<i>abī</i> <i>abušu</i>	<i>abašu</i>	<i>abija</i> <i>abišu</i>
<i>mārum</i> < * <i>mar'um</i>	<i>(māri)/mār awīlim</i>			<i>mārī</i> <i>mārušu</i>	<i>mārašu</i>	<i>mārīja</i> <i>mārīšu</i>

Por la studanto estas grave ekkoni la markojn, kiu diferencigas unu formon disde alia en ĉi tiu subsistemo kaj ĉiuj formoj en ĝi disde la kazfinaĵoj de la rekta stato: tiel *abi* (*bītim*) kaj *ṭuppi* (*awīlim*) estas ne necese genitivaj nek *ṭuppašu* necese akuzativa; *šubtišu* ne povas esti nominativa aŭ akuzativa; *māssu* ne povas esti genitivo.

§ 19. Anstataŭ de la konstruicio konstruita stato + genitivo (*bēl mātīm*) perifrazo povas esti uzata: rekta stato + *ša* + genitivo (*bēlum ša mātīm*, *ana bēlim ša mātīm*). *ša* "(tiu) de"deriviĝas de la determina pronomo *šu* (§63).

Ĉi tiu perifrazo **devas** esti uzata se la reganta substantivo estus apartigata per adjektivo disde la genitivo: \**šar dannum mātīm* estas malebla kaj devas esti anstataŭigata per aŭ *šarrum dannum ša mātīm* aŭ *šar mātīm dannum* "potenca reĝo de la lando". La *ša*-konstruccio estas ankaŭ ofte uzata por eviti ambiguecon, se la konstruita stato havas la saman formon kiel la rekta stato (ekz. la nom. pl. *bēlū*), aŭ por eviti stilistike pezan konstruitan ĉenon (tiel *mār šarrim ša māt Hatti* "la reĝido de la lando Hatti" evitas la pezecon *mār šar māt Hatti*).

**§ 20. Posedaj pronomaj sufiksoj** estas uzataj kun prepozicioj (§ 54,2) kaj substantivoj; kun la lastaj ili povas indiki posedon aŭ aliaj funkciojn de la genitivo (objektiva gen., subjektiva gen.). La formoj estas:

	Singularo	Pluralo
1-a pers.	-ī, -(j)a	-ni
2-a pers. virg.	-ka	-kunu
2-a pers. ing.	-ki	-kina
3-a pers. virg.	-šu	-šunu
3-a pers. ing.	-ša	-šina

La sufikso de la 1-a pers. sing. alprenas tri formojn en la norma mnb.: -ī malantaŭ substantivo en la nom./akuz. sing., -ja malantaŭ gen. sing./oblikva plur., sed tiu estas reduktata al -a malantaŭ nom. pl (transkribata *bēlūa* "miaj mastroj" aŭ kun eksplicita markado de la silablismo - *bēlū'a*). Tiel *bēlī* "mia mastro". *aššātu'a* "miaj edzinoj", *ana bēlija* "al mia mastro", *ana bēlija* "al miaj mastroj".

Konsideru (§ 83 f), ke dentalo/siblanto + *š* > *ss*: \**māt-šu* > *māssu* "lia lando", \**rēš-ša* > *rēssa* "ŝia kapo".

### Vokablaro

<i>abum</i> , pl. <i>abbū</i> : patro	<i>ešemtum</i> , pl. <i>ešemtum</i> : osto
<i>aḥum</i> , pl. <i>aḥḥū</i> : frato	<i>ḥulqum</i> : perditaĵo
<i>aššatum</i> (stamo * <i>ant-</i> ): edzino	<i>idum</i> : brako, flanko
<i>awātum</i> , pl. <i>awātum</i> : vorto	<i>īnum</i> : okulo
<i>bānium</i> , <i>bānūm</i> : konstruanto, faranto	<i>itti</i> (prep.): kun; <i>ittišu</i> "kun li (§ 84i)
<i>bēltum</i> , pl. <i>bēlētum</i> : sinjorino, mastrino	<i>kalûm</i> : tuteco, tutaĵo
<i>bēlum</i> : sinjoro, mastro, posedanto	<i>kunukkum</i> : cilindra sigelilo
<i>bīšum</i> : posedo	<i>libbum</i> : koro, centro, mezo
<i>dārium</i> , <i>dārûm</i> : eterna	<i>dMarduk</i> : la dio Marduk, patrono de Babilono
<i>dīnum</i> : juĝo, juĝafero	<i>mārum</i> : filo
<i>ekallum</i> (<sum. É.GAL): palaco	<i>mātum</i> (i.), pl. <i>mātātum</i> : lando
<i>eli</i> : sur, super; <i>elišu</i> "sur ĝi" (§84i)	<i>mišarum</i> (* <i>jšr</i> ): justeco
<i>eqlum</i> (v.), pl. <i>eqlētum</i> (i.) (* <i>ḥql</i> ): kampo	<i>nidintum</i> , <i>nidittum</i> : donitaĵo
<i>errēšum</i> (* <i>ḥrt</i> ): farmanto	<i>qātum</i> (i.): mano
<i>eršetum</i> : tero	<i>šarratum</i> : reĝino

<i>qīštum</i> : donaco	<i>šarrūtum</i> : reĝeco
<i>rē'ūtum</i> : paŝtisteco	<i>šiprum</i> : laboro, verko
<i>rubā'um</i> , <i>rubûm</i> : princo, nobelo	<i>šubtum</i> : loĝejo, sidejo
<i>šeḥrum</i> , i. <i>šeḥertum</i> : malgranda	<i>šulmum</i> : san(ec)o
<i>šibtum</i> , konstr. <i>šibat</i> (*wšb): interezo	<i>šumum</i> "nomo, id(ar)o2
<i>šīrum</i> , i. <i>širtum</i> : altranga	<i>šūqurum</i> , i. <i>šūqurtum</i> (*wqr): tre multekosta, altvalora
<i>šaknum</i> (< <i>šakinum</i> ): guberniestro, estro	<i>ṭuppum</i> : argila tabulo
<i>šaluštum</i> : unu triono (i. de la orda numeralo <i>šalšum</i> "tria")	<i>u</i> : kaj
<i>šamā'u</i> , <i>šamû</i> (v. pl.): ĉielo	<i>zittum</i> : parto, porcio, kvoto (de propraĵo)
<i>zērum</i> : semo	

## Kojnoskribaj signoj

Signoj	Fonetika	Logografia
	<i>ir, èr</i>	İR = <i>wardum</i> "sklavo, servisto"
	<i>ti, tì</i>	TI(.LA) = <i>balātum</i> "vivi"
	<i>ia</i> , ankaŭ <i>ie, ii, iu</i>	
	( <i>tur</i> )	TUR = <i>šeḥrum</i> "malgranda"
	<i>ad</i>	DUMU = <i>mārum</i> "filo"
	<i>ga, qá</i>	AD = <i>abum</i> "patro"
	<i>id, ed</i>	GA = <i>šizbum</i> "lakto"
	<i>wa, we, wi, wu; pi, pe</i>	Á = <i>idum</i> "brako, flanko"
	<i>ši, lim</i>	GEŠTU = <i>uznum</i> "orelo"
		IGI = <i>inum</i> "okulo"
		IGI = <i>pānum</i> "fronto", pl. "vizaĝo"
	<i>lum, (lu4)</i>	LIM = <i>limum</i> "mil"

## Ekzerco

1. Normaligu kaj traduku: *be-el ŝa-me-e ù er-še-tim. a-ra-an di-nim. i-na qá-at mār a-wi-lim. aš-ša-at a-wi-lim. aš-ša-sú. warad ekallim. šār mi-ša-ri-im. li-ib-bi* <sup>d</sup>*Marduk. zērum da-rí-um ŝa ŝar-ru-tim. mār a-wi-lim ŝe-eḥ-ra-am. ŝa-lu-uš-ti eqlim. ŝi-ba-sú. it-ti be-el-ti-ša. be-le-sà. e-li-šu. it-ti-šu-nu. re-ú-si-na. be-el-ni. eṣemti warad a-wi-lim. ŝum-šu ŝi-ra-am. i-na li-ib-bi-šu. a-na be-lí-šu. bīs-sú (É-sú). zitta-šu. a-na aš-šati-šu. a-wa-ti-ia ŝuqú-ra-tim. di-ni. ma-sú. a-na ni-ši-šu. er-re-šum. er-re-su. be-el ḥu-ul-qí-im. ḥu-lu-uq-šu.*

2. Traduku en la akadan: la filo de la viro. kun la filo de la viro. lia filo. kun lia filo. la frato de la viro. la laboro de la viro. la dono de la viro. la edzino de la viro. la loĝejo de la viro. lia tabulo. ilia sigelilo. via koro. nia faranto. ŝia filo. mia frato. lia patro. mia posedo. iliaj ostoj. mia vorto. ŝia malgranda reĝino. kun mia parto. lia farmanto.

3. Kojnoskribe:

ጥቅ ስራ ሲሆን; ቱቱ ሌላ ምላሽ ጥቅ ሌላ ሲሆን;  
 ሌላ ሌላ ስራ ጥቅ ስራ ሲሆን; ቱቱ ሌላ  
 ምላሽ ስራ ስራ ጥቅ ሌላ ሲሆን; ቱቱ ሌላ ስራ;  
 ጥቅ ሌላ ምላሽ ስራ; ቱቱ ሌላ ምላሽ ስራ;  
 ጥቅ ስራ ስራ ጥቅ ስራ ሲሆን; ቱቱ ሌላ ምላሽ ስራ ስራ; ጥቅ ሌላ ጥቅ ስራ ስራ ስራ

## LECIONO 3

### G-STAMO DE FORTA VERBO (I)

§ 21. **La verbo ĝenerale.** La akada havas kelkajn pure substantivajn stamojn kun neniuj adjektivaj aŭ verbaj parencaj vortoj, ekz. *ab-* "patro, *kalb-* "hundo". Ĝenerale, tamen, vortoj kun verba funkcio taŭgas por libere formi parencajn ortojn kun substantivaj aŭ adjektivaj funkcioj kaj en sama maniero substantivoj aŭ adjektivoj povas transpaŝi funkciajn modelojn. Tiel ni trovas la verbon *išriq* "li ŝtelis", la adjektivon *šarqum* "ŝtelita", la substantivon *šarrāqum* "ŝtelisto"; disde tia grupo de vortoj ni povas izoli radikon komunan al ĉiuj: la konsonanta sekvenco \**šrq*, kiu (kiel kaj ĝia formo kaj la asterisko indikas) estas abstraktaĵo neniam tiel atestita. La plej multaj de tiaj radikoj en la akada estas trikonsonantaj, sed dukonsonantaj kaj kvarkonsonantaj verboj estas ankaŭ troveblaj.

Kiel en aliaj semidaj lingvoj ni diferencigas la "fortan" verbon (paradigmo: *parāsum* "apartigi") disde la diversaj tipoj de "malfortaj" verboj, kiuj estas submetataj al fonetika modifado (asimilado de *n* [§ 83e], malapero de '1-7 [§§ 82j kaj 84c-f], ktp.) kaj disde neregule formataj verboj.

§ 22. **Stamoj.** Kiel en la hebrea aŭ araba, akadaĵaj verboj estas konjugaciaj en diversaj subsistemoj nomataj "stamoj"; tiuj ĉi distingiĝas per la malhavo aŭ havo de duobliĝintaj kaj infiksitaj aŭ prefiksitaj elementoj. Estas kvar ĉefstamoj, kutime nomataj G, D, Ŝ, N aŭ II, II, III, IV (G, de germana "Grundstamm", signifas baza stamo; D rilatas al la duobliĝinta meza radikalo, kiu karakterizas ĉi tiun stamon; Ŝ kaj N indikas la afiksitajn elementojn ŝ kaj *n*); la kvar stamoj repondas al la hebreaĵaj Qal, Pi'el, Hif'il kaj Nif'al. Pliaj stamoj povas esti formataj de ĉi tiuj per la infiksado de *-ta-* aŭ *-tan-*. La infiksitaj stamoj nomiĝas Gt aŭ I/2, Gtn aŭ I/3, Dt aŭ II/2, Dtn aŭ II/3, ktp.

§ 23. **"Tempoj".** En ĉiu stamo ni trovas kvar finitivajn<sup>1</sup> formojn, kutime nomataj tempoj: (1) la "**prezenco**" (*iparras*) esprimas kontinuan agadon kaj estas normale tradukata per esperanta prezenco aŭ futuro ("li konstruas, li estas konstruanta, li konstruos"); (2) la "**preterito**" (*iprus*) esprimas agon, kiu okazas je ununura punkto en la tempo kaj estas ofte tradukata per pasinta rakonta tempo ("li konstruis"); (3) la "**perfekto**" (*iptaras*) reprezentas la verban agadon en tempa rilato al alia agado aŭ al la estanta tempo kaj estas kutime tradukata per pasinta tempo "li konstruis", "li estas konstruanta"); (4) la "**stativo**" (*paris*) esprimas staton "li estas maljuna" prefere al agado aŭ procedo ("li maljuniĝas"). Aldone al la kvar tempoj, ĉiu stamo havas **imperativon**, substantivan formon (**infinitivon**) kaj du adjektivajn formojn (**participon** kaj **verban adjektivon**).

§ 24. **Verbtipoj kaj vokalklasoj:** La akadaĵaj verboj dividiĝas en du bazaj grupoj: tiuj, kiuj havas origine verban funkcion esprimi agon aŭ procedon, kiujn ni povas nomi ag-verbojn kaj verboj, derivitaj de adjektivoj kaj

---

<sup>1</sup> Finitivaj formoj estas tiaj, kiuj esprimas predikataĵon.



esprimantaj la komenciĝon aŭ ekziston de stato, kiujn ni povas nomi stat-verbojn.

Ag-verboj estas troveblaj en kvar klasoj, karakterizataj per diferencaj stamvokaloj (la stamvokalo estas la vokalo, kiu antaŭiras la finan radikalon en finitivaj formoj); la klasoj estas signataj per la stamvokalo de la prez. G (*iparras*) kaj pret. G (*iprus*).

<i>a/u</i> -klaso	( <i>iparras iprus</i> "apartigi")
<i>a</i> -klaso	( <i>iŝabbat iŝbat</i> "kapti")
<i>u</i> -klaso	( <i>irappud irpud</i> "kuri")
<i>i</i> -klaso	( <i>ipaqqid ipqid</i> "konfidi")

La rilato de ĉi tiuj paradigmoj al la verba signifo ne estas rigida kaj ŝoviĝo de unu vokalklaso al alia ne estas malofta; malgraŭ ĉio la sekvontaj tendencoj estas observeblaj: la *a/u*- kaj *a*-klasoj enhavas transitivajn verbojn; la *u*-klaso netransitivajn; la *i*-klaso transitivajn, kies rezulto estas farata per momenta agado kaj kelkajn netransitivan verbojn de moviĝo.

Stat-verboj estas dominante *i*-tipaj, sed la stamvokalo *a* ankaŭ troviĝas: *damāqum* "fariĝi bona": *idammīq, idmiq; pašāḥum* "ripozi en paco": *ipaššaḥ, ipšaḥ*.

**§ 25. La preterito** (*iprus, iŝbat*, ktp.) estas formata per aldono de prefiksoj kaj sufiksoj al la bazo *-prus-* (*-ŝbat-*, *-pqid-*). Ĝi normale reprezentas simplan pasintan agon (*iŝbat* "li kaptis") aŭ la komenciĝo de stato (*idmiq* "li pliboniĝis"). La formoj de *parāsum* estas jenaj:

sing. 3.	<i>iprus</i>	plur. 3. v.	<i>iprusū</i>
		3. i.	<i>iprusā</i>
	2. v.	<i>taprus</i>	2. <i>taprusā</i>
	2. i.	<i>taprusī</i>	
	1.	<i>aprus</i>	1. <i>niprus</i>

(En aliaj vokalklasoj la stamvokalo anstataŭas *u*: *iŝbat, taŝbat, taŝbatī; irpud, tarpud*.)

Notu, ke en la mnb. la 3-a pers. sing. havas komunan formon por virgenro kaj ingenro ("li/ŝi apartigis"); aliaj dialektoj konservas diferencon formon *taprus* "ŝi apartigis".

Ankaŭ 3-a pers. dualo *iprusā* ekzistas, sed ĝi estas ĝenerale anstataŭigata per la pluralo.

**§ 26. La prezenco** de ag-verboj reprezentas agon kiel kontinuan: *irappud* "li kuras, estas kuranta, kuros". En stat-verboj la prezenco havas komencan sencon: *iballuṭ* "li komenciĝas bonfarti".

La prezenco karakteriziĝas per duobliĝo de la meza radikalo; ĝia konjugacio similas al la preterito:

sing. 3.	<i>iparras</i>	plur. 3. v.	<i>iparrasū</i>
		3. i.	<i>iparrasā</i>
2. v.	<i>taparras</i>	2.	<i>taparrasā</i>
2. i.	<i>taparrasī</i>		
1.	<i>aparras</i>	1.	<i>niparras</i>

kun regula anstataŭo de aliaj stamvokaloj en *irappud*, *ipaqqid*.

**§ 27. La imperativo**, kiu esprimas pozitivajn ordonojn, estas formata surbaze de la preterito *\*prus*, *\*šbat*, *\*rpud*, *\*pqid*. En la ingenra sing. komenca dukonsonantaro estas dissolvata per la enmeto de vokalo (§ 83n); ĉi tiu kutimas esti la sama kiel la stamvokalo (*purus*, *šabat*, *rupud*, *piqid*), sed en kelkaj verboj de la *a*-klaso la vokalo *i* estas enmetata (*limad* "lernu!", *pilaḥ* "timu!", *rikab* "rajdu, veturu!", *tikal* "konfidu!"). Se finaĵo almetiĝas, la antaŭiranta vokalo elfalas:

sing. virg.	<i>purus</i>	<i>šabat</i>	<i>limad</i>	<i>rupud</i>	<i>piqid</i>
sing. ing.	<i>pursī</i>	<i>šabtī</i>	<i>limdī</i>	<i>rupdī</i>	<i>piqdī</i>
plur.	<i>pursā</i>	<i>šabtā</i>	<i>limdā</i>	<i>rupdā</i>	<i>piqdā</i>

(La formo uzata por esprimi negativajn ordonojn estos traktata en § 47.)

**§ 28. La infinitivo** estas deklinaciata verba substantivo, kiu formiĝas laŭ la paradigmo *parāsum* de la G-stamo (pri variantoj fonetike kondiĉataj kiel *šebērum*, *erēbum* vidu § 84f-h). Pro ĝia duobla karaktero kiel verba kaj substantiva formo, la infinitivo povas esti uzata en verbaj konstrukcioj kun akuzativa objekto (tiuj estos diskutataj en § 75) aŭ en nomaj konstrukcioj kiel konstruita stato + genitivo; *ina* estas uzata por esprimi tempon, *ana* celon:

*ina parāsika* "kiam vi apartigas" (laŭv. " en via apartigado")  
donu al mi boaton *ana rakābija* "por ke mi povu veturi en ĝi" ("por mia veturado")  
*ana sakāp nakrim* "por renversi la malamikon" ("por la renversado de la malamiko").

**§ 29. La (aktiva) participo** havas en la G-stamo la formon *pārisum* kun normala adjektiva deklinacio (i. *pāristum*, v. pl. *pārisūtum*, i. pl. *pārisātum*). La participo normale funkcias kiel substantivo, t. e. ĝi regas genitivon prefere al akuzativo: *pāliḥ ilim* "diotima (persono)". Stat-verboj (§ 24) ne formas participon (*\*dāmiqum*); ĝi estas anstataŭigata per la responda adjektivo (*damqum*).

**§ 30. La verba adjektivo** havas en la G-stamo la formon *parsum* (< *\*parisum*), kun adjektiva deklinacio. La verba adj. de ag-verboj normale havas pasivan sencon: *ḥabālum* "maljuste trakti". *awīlum ḥablum* "trompita viro"; komparu la verban adjektivon de stat-verboj *damqum* "bona", *balṭum* "viva".

**§ 31. Noma frazo** estas frazo sen finitiva verbformo kiel predikato. Ĝi estas ofte karakterizata per sendependa pronomo (§ 54,4) aŭ enklitika -*ma* (§ 40,3):

*Adad šarrum-ma* "Adad estas reĝo"  
*ul abī atta* "vi ne estas mia patro"  
*salīmātum ša awīl Ešnunna daštum-ma* "la aliancoj de la reganto de Ešnunna estas perfido".

**§ 32. Verba frazo** normale havas la ordon: subjekto - objekto - nerekta objekto - verbo: *šarrum eqlam ana awīlim iddin* "la reĝo donis al la viro kampon". La fina pozicio de la verbo, kiu estas nekutima en la semida, estas verŝajne pro sumera influo.

### Vokablaro

<i>alākum</i> (prez. <i>illak</i> , pret. <i>illik</i> ; pliaj formoj vidu en § 68): iri	<i>paqādum</i> ( <i>i</i> ): zorgi pri (akuz.), konfidi (akuz.) al ( <i>ana/dat.</i> )
<i>dajjānum</i> : juĝisto	<i>parāsum</i> ( <i>a/u</i> ): tranĉi, dividi
<i>iŝum</i> : arbo, ligno	<i>paŝātum</i> ( <i>i</i> ): forigi, forstreki
<i>kaspum</i> : arĝento	<i>pûm</i> : buŝo (konstr.: <i>pī</i> )
<i>kaŝādum</i> ( <i>a/u</i> ): atingi, alveni, konkeri	<i>purussā'um</i> , <i>purussûm</i> : decido
<i>maĥāŝum</i> ( <i>a</i> ): bati	<i>raqāmum</i> ( <i>u</i> ): postuli, pretendi leĝan rajton
<i>mû</i> (plur. < <i>ma'u</i> ): akvo	<i>rittum</i> ( <i>i.</i> , <i>*rĥt</i> ): manartiko, mano
<i>nadānum</i> (prez. <i>inaddin</i> , pret. <i>iddin</i> > <i>*indin</i> : § 83e) doni; ( <i>ana kaspim</i> ) <i>nadānum</i> : vendi	<i>ŝabātum</i> ( <i>a</i> ): (ek)kapti
<i>nakāsum</i> (prez. <i>inakkis</i> , pret. <i>ikkis</i> : detranĉi, fortranĉi	<i>ŝakānum</i> ( <i>a/u</i> ): meti, loki, starigi
<i>namkûrum</i> : posedo ( <i>*mkr</i> , kp. § 83 c)	<i>ŝaqālum</i> ( <i>a/u</i> ): pesi, pagi
<i>naŝārum</i> (prez. <i>inaŝsar</i> , pret. <i>iŝsur</i> : § 83e): gardi, protekti	<i>ŝarākum</i> ( <i>a/u</i> ): donaci, doni
<i>nīŝum</i> : ĵuro (laŭv. vivo); kutime en <i>nīŝ ilim</i> (ĵuro) per la vivo de dio	<i>ŝarāqum</i> ( <i>i</i> ): ŝteli
<i>nīŝ ŝarrim</i> kaj simile plu	<i>ŝebērum</i> ( <i>i</i> , prez. <i>iŝebbir</i> , <i>teŝebbir</i> , <i>eŝebbir</i> ; pret. <i>iŝbir</i> , <i>teŝbir</i> , <i>eŝbir</i> , v. adj. <i>ŝebrium</i> ; kp. § 84gh): rompi
<i>nuĥŝum</i> : abundo	<i>ŝumma</i> (konj.): se
<i>palāĥum</i> ( <i>a</i> ): timi, adori	<i>zakārum</i> ( <i>a/u</i> ): paroli, diri, nomi

## Kojnoskribaj signoj

Signoj	Fonetika	Logografia
	<i>ba</i>	
	<i>zu, sú, sù</i>	ZU = <i>idûm</i> "scii" ZU = <i>lamādum</i> "lerni"
	<i>ig, eg</i>	GÁL = <i>bašûm</i> "esti"
	<i>am</i>	
	<i>iz, ez, (giš, giz)</i>	GIŠ = <i>išum</i> "arbo, ligno"
	<i>šu, (qad)</i>	ŠU = <i>qātum</i> "mano"
	<i>ud, u<sub>4</sub>, tam, pir, (par, laḥ, liḥ, ḥiš, tú)</i>	U <sub>4</sub> = <i>ûmum</i> "tago"  dUTU = dŠamaš (sun-dio) BABBAR = <i>pešûm</i> "blanka" dIŠKUR = dAdad (ŝtormdio)
	<i>im, em</i>	IM = <i>tiṭṭum</i> "argilo" IM = <i>šārum</i> "vento"
	<i>za, ŝa, sà</i>	KÛ = <i>ellum</i> "pura, sankta" KÛ.BABBAR = <i>kaspum</i> "arĝento" GUŠKIN (skribata KÛ.GI) = <i>ḥurāšum</i> "oro"

## Ekzerco

1. Normaligu kaj traduku: *iš-ru-uk. im-ha-aš. ik-šu-ud. ip-ši-iṭ. mi-ša-ra-am i-na pī ma-tim aš-ku-un. šum-ma da-a-a-nu-um pu-ru-sà-am ip-ru-ús. a-wi-lum namkūr ilim iš-ri-iq. bīt(bīs)-sú iš-ba-at. i-ša-ak-ka-nu, i-na-ša-ar. ip-pa-aq-qī-du. ni-iš i-lim i-za-kar. i-ra-ag-gu-um. i-še-eb-bi-ru. i-sa-am i-na-ak-ki-su. ritta-šu i-na-ki-su. kaspam i-ša-qá-lu. bīt-sú a-na kaspim i-na-ad-di-in. pa-li-iḥ ì-li.ša-ki-in me-e nu-úḥ-šim a-na ni-ši-šu. pa-qí-id bi-tim. i-na a-la-ki-šu. a-na ka-ša-dim. bi-tum na-ad-nu-um.*

2. Konjugaciu en pret., prez. kaj imp. kaj indiku participon kaj verban adj.: *kašādum, šarāqum, šebērum.*

3. Traduku en la akadan: vi levis pretendon. li adoras la diojn. li batis la viron. mia mastro rompis sian tabulon. Mi konfidas mian patron al la dioj. li starigis sian donaĵon antaŭ la dion. Li estas pesanta arĝenton en la domo de sia patro. Li eliminis miajn vortojn. kiam vi alvenas. por gardi lian domon. la kaptita viro.

4. Kojnoskribe:

## LECIONO 4

### G-STAMO DE FORTA VERBO (II). VERBAJ SUFIKSOJ. VENTIVO. SUBJUNKTIVO

§ 33. La **stativo** estas konjugaciata formo de la verba adjektivo *parsum* (< \**parisum*). Ĝi signas iafoje staton aŭ daŭran efikon de agado: *damiq* "li estas (estis, estos) bona" (stat-verbo), *paris* "ĝi estas (estis, estos) decidata" (ag-verbo). En ag-verboj ĝi estas kutime pasivsenco (*ŝabit* "li estas en kaptiteco"), sed okaze aktivsenco (*bītam ŝabit* "li posedas domon").

La stativo de ag-verboj formiĝas surbaze de *paris*, en kiu la *i* estas eliziata kiam finaĵo estas aldonata. Stat-verboj havas kutime ankaŭ la bazon *paris*, sed povas ankaŭ havi la bazon *parus* aŭ *paras*: *maruŝ* "li estas malsana" < *marāŝum* (*a*), *rapaŝ* "ĝi estas vasta" < *rapāŝum* (*i*). La formoj de la stativo estas:

Sing. 3v.	<i>paris</i>	Plur. 3v.	<i>parsū</i>
3i.	<i>parsat</i>	3i.	<i>parsā</i>
2v.	<i>parsāta</i>	2v.	<i>parsātunu</i>
2i.	<i>parsāti</i>	2i.	<i>parsātina</i>
1.	<i>parsāku</i>	1.	<i>parsānu</i>

Iu substantivo aŭ adjektivo povas esti uzata kun stativaj finaĵoj kaj funkcias kiel predikato:

*ŝarrāku* "mi estas reĝo", *ŝar* "li estas reĝo" < *ŝarrum* (subst.)  
*rabiāta*, *rabāta* "vi estas granda" < *rabûm* (adj.)  
*damqū* "ili estas bonaj" < *damqum* (adj.) aŭ *damāqum* (verbo).

Nefina *-a-* de la stativaj finaĵoj > *e* en akordo kun § 84f: *bēl*, *bēlet*, *bēlēta*, *bēlēti*, *bēlēku*, *bēlū*, *bēlā*, *bēlētunu*, *bēlētina*, *bēlēnu*.

§ 34. La **perfekto** formiĝas per infiksado de *-t(a)* malantaŭ la unua radikalo. Kvankam ĉi tiu tempo dividas formojn kun la **stamoj**, kiuj infiksas *-t(a)-*, ĝi devas klare esti distingata disde ili. Kiel aliaj tempoj la perfekto esprimas **aspekton** de agado, dume la derivitaj stamoj havas **leksikan** signifon.

La perfekto G havas jenajn formojn:

sing. 3.	<i>iptaras</i>	plur. 3. v.	<i>iptarsū</i>
		3. i.	<i>iptarsā</i>
	2. v.	2.	<i>taptarsā</i>
	2. i.		<i>taptarsī</i>
	1.	1.	<i>niptaras</i>

En **dependaj** tempaj kaj kondiĉaj (§ 39) propozicioj, kiam la ĉefverbo estas futura, imperativa aŭ volitiva (§ 42), la perf. indikas perfektan futuron (t.e. futuro antaŭ la futuro de la ĉefpropozicio):

*inūma gerrētum iptarsā* "kiam la karavanoj estas (estos) foririntaj"  
*ištu šābum šū iktašdakkum šābam šāti ana šēr aḥika ṭurdam* "kiam tiuj viroj estas (estos) venintaj al vi, sendu tiujn virojn al via frato"

Pri la uzo de la perfekto en pasintaj kondiĉaj propozicioj vidu § 39.

En **sendependaj** propozicioj la perfekto havas jenajn uzojn:

(a) en mnb. ni ofte trovas perfektan malantaŭ unu aŭ pli preteritoj kaj kutime ligita al ili per *-ma*; ĉi tiu sekvenco, pret. + *-ma* + perf. (la tiel nomata sinsekvo de tempoj aŭ latine "consecutio temporum"), esprimas pasintajn agojn okazantajn sinsekve:

*iḥliqma iṣṣabtūšu* "li fuĝis, sed ili kaptis lin"  
*ana GN asniqma ālam šāti aṣḥupma aṣṣabat* "mi atingis GN kaj invadis kaj ekkaptis la urbon"

(b) la perfekto (kiel la pret.) povas esti uzata kiel "letera tempo" esprimanta agojn de la tempa vidpunkto de la letera adresato, ne de ĝia adresanto (ĉi tiu uzado estas ofte enkondukata per la adverboj *anumma* "per tio" aŭ *inanna* "nun"); traduko estas plej bone indikata en la prezenco:

*ṭuppī anniam aštaprakkum* "mi sendas ĉi tiun leteron de mi al vi"  
*anumma aštaprakkum/ašpurakkum* "Mi skribas per tio al vi"  
*inanna aṭṭardakkum* "mi nun sendas al vi".

1. Pri la asimilado de *t* de la infikso al la unua radikalo en formoj kiel *iṣṣabat* < \*iṣṭabat, *igdamur* < \*igtamur, vidu § 83h.

2. La stamvokalo de la perf. estas identa kun tiu de la prez. G: *iptaras*, *iṣṣabat*, *irtapud*, *iptaqid*.

3. Notu, ke, kiam finaĵo aldoniĝas, la fina vokalo de la baza formo eliziĝas: \*iptaras-ū > iptarsū.

**§ 35. Pronomaj sufiksoj**, akuzativaj kaj dativaj, povas esti aldonataj al ĉiuj finitivaj formoj de la verbo, indikativo kaj subjunktivo kaj al la imperativo: *išrukū* "ili donis", *išrukūšu* "ili donis lin/ĝin", *išrukūšum* "ili donis al li". La formoj estas la jenaj:

		Akuzativo	Dativo
Sg.	1-a	-ni	-am
	2-a virg.	-ka	-kum
	2-a ing.	-ki	-kim
	3-a virg.	-šu	-šum
	3-a ing.	-ši	-šim
Pl.	1-a	-niāti	-niāšim
	2-a virg.	-kunūti	-kunūšim
	2-a ing.	-kināti	-kināšim
	3-a virg.	-šunūti	-šunūšim
	3-a ing.	-šināti	-šināšim

1. La formo de la 1-a sg. dat. *-am* estas uzata nur malantaŭ senfinaĵaj verbformoj (*iŝruk*, *taŝruk*, *aŝruk*, *niŝruk*: ekz. *iŝruk-am* "li donis al mi"); malantaŭ *-ī* de la 2-a ing. sing. ĝi estas reduktata al *-m* (*taŝrukī-m* "vi donis al mi"), kaj malantaŭ *-ū*, *-ā* de la 2-a kaj 3-a pers. plur. ĝi estas anstataŭigata per *-nim* (*iŝrukū-nim* "ili donis al mi").

2. Notu denove, ke dentalo/siblanto + *ŝ* > *ss* (§ 83f) en *ipqissu* < *\*ipqid-ŝu*, *imḥassu* < *\*imḥaŝ-ŝu* kaj similaj formoj.

3. Dat. kaj akuz. sufiksoj povas esti uzataj kune, je kio la dat. antaŭiras: en ĉi tiu kazo fina *-m* de la dat. asimiliĝas al sekva konsonanto: *iŝrukūŝuŝŝu* < *\*iŝrukū-ŝum-ŝsu* "ili donis ĝin al li".

4. Perdiĝo de la mimacio en la dat. okazas ĉirkaŭ la fino de la mnb.; per tio distingo inter kelkaj formoj de dat. kaj akuz. perdiĝas (ni, ki, ŝu, ŝi) kaj la konfuziĝo inter dat. kaj akuz. sufiksoj ĝenerale kreskas.

**§ 36. La ventivo.** Speciala formo de la verbo, kutime nomata la ventivo, estas forme identa kun verbo + sufikso 1-a sing. dat. *-am/-m/-nim*; elekto de formoj sekvas la normojn donitajn en § 35,1 (*iprus-am*, *taprusī-m*, *iprusū-nim*). La formo ŝajnas esti disvolviĝo el la dat. "al mi", sed la origina dat. senco de la sufikso perdiĝis. Kun verboj de moviĝo la ventiva finaĵo povas indiki la direkton "ĉi tien" (*illik* "li (for-)iris", sed *illikam* "li venis"), kaj la nomo ventivo deriviĝas de ĉi tiu senco; en la plej multaj ekzemploj, tamen, la finaĵo ŝajnas havi prefere stilistikan ol leksikan sencon; frazoj kiel *ana ŝērija takaŝŝad* "vi venos al mi"

(ĉi-direkta movo, neniu ventiva markilo), *ana ŝērika akaŝŝad-am-ma* "mi venos al vi" (tiudirekta movo, ventiva markilo) kaj *tēmam limdī-m-ma ŝuprī* "eltrovu la informon kaj skribu!" (nenia movo, ventiva markilo) estas kutimaj.

Kun verboj de moviĝo kaj aliaj verboj la ventivo estas precipe kutima antaŭ *-ma* kaj pronomaj sufiksoj, dativaj kaj akuzativaj, speciale la 1-a sing. akuz. (*iŝbat-an-ni* "li kaptis min") kaj ĉiuj dativaj sufiksoj escepte de la 1-a sing., kun kiu ĝi estus identa (*iŝruk-ak-kum* "li donis al vi", sed *iŝruk-am* "li donis al mi"). Fina *-m* de la ventivaj *-am*, *-m* kaj *-nim* asimiliĝas al la sekva konsonanto: *iŝbatū-nin-ni*, *taŝrukī-ŝ-ŝum*.

*adi allakam* "ĝis mi venas (tien)

*aṭarradakkuŝŝuma* < *\*aṭarrad-am-kum-ŝu-ma* "mi sendos lin al vi"

*ummanātum iptatrānim ana GN ikŝudānim* "la trupoj foriris kaj atingis GN"

1. Ĉar dat. sufiksoj "al mi" kaj la ventivaj finaĵoj estas forme identaj, povas esti malklare, kio estas intencata. Ĝenerale, se verbo troviĝas kun klaraj dat. sufiksoj (*iŝrukŝum* ktp.), *-am/-m/-nim* povas esti prenataj kiel dat.; se ĝi ne estas (tiel *\*irappudūŝum* estas netrovebla) la finaĵoj povas esti prenataj kiel ventivo.

2. Perdiĝo de mimacio okazas ĉirkaŭ la fino de la mnb., tiel ke en la pli malfruaj periodoj la ventivaj finaĵoj estas *-a* kaj *-ni*, sen speciala ventiva formo en la 2-a ing. sing.

**§ 37. Kelkaj konjunkcioj** (subjunkcioj), kiuj enkondukas dependajn propoziciojn estas *inūma* "kiam", *lāma* "antaŭ ol", *warki* "post kiam",

*aŝŝum* "ĉar". La verboj en tiaj propozicioj estas en la subjunktiva modo (§ 38). Relativaj propozicioj ankaŭ estas en la subjunktivo; ĉi tiuj estas plej ofte enkondukataj per *ŝa* "kiu" (la uzo de *ŝa* estos diskutata pli detale en § 63); en la mnb. la konstruado substantivo en la konstruita stato+ verbo en la subjunktivo esprimas relativan propozicion: *ĉem almadu* "la novaĵo, kiun mi eksciis" (§ 18).

**§ 38. La subjunktivo.** Finitivaj verbformoj (pret., pres., perf., stat.), kiam ili estas uzataj en dependaj propozicioj, staras en la subjunktiva modo. La neado de dependaj propozicioj estas esprimata per *lā*, dume la neado de sendependaj propozicioj estas kutime esprimata per *ul* (vidu § 50).

La subj. estas formata per aldonado de *-u* al verbformoj, kiuj ne havas finaĵon (*iprus*, *taprus*, *aprus*, *niprus*, *paris*, *iparras* ktp.); verbformoj kun finaĵo (*-ī*, *-ū*, *-ā*, *-at* kaj la ventivaj finaĵoj) restas senŝanĝaj kaj havas tial **komunan formon en indik. kaj subj.:**

*iprus* "li separis", *ŝarrum ŝa iprusu* "la reĝo, kiu separis", *inūma iprusu* "kiam li separis"

*iprusū* "ili separis", *ŝarrū ŝa iprusū* "la reĝoj, kiuj separis", *aŝŝum iprusū* "ĉar ili separis"

*ikŝudam* "li alvenis", *ŝarrum ŝa lā ikŝudam* "la reĝo, kiu ne alvenis", *warki ŝarrum ikŝudam*

"post kiam la reĝo alvenis"

*balit* "li estas en bona sano", *ŝarrum ŝa baltu* "la reĝo, kiu estas en bona sano"

*baltat* "ŝi estas en bona sano", *ŝarratum ŝa baltat* "la reĝino, kiu estas en bona sano"

*eqlum nadin* "la kampo estas donita", *kīma nadnu* "sub la kondiĉoj de la transdono" (laŭv. "kiel ĝi estas/estis donita").

**§ 39. ŝumma "se"** enkondukas noman propozicion aŭ propozicion en la indikativo; la negacio estas *lā*. La prez. kaj stat. en *ŝumma*-propozicio havas sian normalan signifon; la pret. indikas tempan prioritaton al ĉefa verbo, kaj la perf. ŝajne havas preskaŭ la saman sencon, kvankam kelkaj scienculoj postulas por ĝi aldonan hipotezan nuancon. En leĝkodoj, por konformigi la eŭropan uzadon, pret. kaj perf. estas kelkfoje tradukataj kiel prezenco:

*ŝumma iŝriq/iŝtariq* "se li ŝtelis"

*ŝumma bitam ipluŝma iŝtariq* "se li enrompis en domon kaj ŝtelis" (consecutio temporum, § 34)

*ŝumma nakrum ana ŝerika pānam iŝtaknam* "se la malamiko turniĝas al via direkto" (perfektiva futuro, § 34)

**§ 40. Aliaj konjunkcioj** estas kunordigaj kaj ne necesigas la uzon de la subjunktivo:

1. Estas du evidente homonimaj konjunkcioj *u*. *u* "kaj" (< \**wa*) estas simpla kunordiga konjunkcio, kiu kunligas frazojn, frazpartojn aŭ unuopajn vortojn. *ū* "aŭ" (< \**aw*) kunligas unuopajn vortojn (nomojn aŭ



verbojn). La du konjunkcioj ne estas grafike distingataj en kojnoskribo, sed devas esti diferencigataj per la kunteksto.

2. *lū ... lū* "aŭ ...aŭ" kunligas frazpartojn kaj unuopajn vortojn: *lū kaspam lū ĥurāšam ū lū mimma šumšu*

"(se li ŝtelis) aŭ arĝenton aŭ oron aŭ kion ajn".

3. La enklitika partikulo *-ma* havas du ĉefajn funkciojn krom la markado de nomaj frazoj (§ 31). (a) Afiksate al unuopa vorto, ĝi estas emfaza partikulo: *anakūma* "mi mem", *ina mūšimma* "en tiu sama nokto".

(b) Afiksate al verbo de unu propozicio kaj antaŭirante alian verban propozicion, ĝi havas kunligantan forton; diference de la simpla kunordiga konjunkcio *u*, tamen, ĝi implikas tempan aŭ logikan sekvencon inter la du propozicioj. Ĝi povas ofte esti tradukata "kaj, kaj tiam", sed aliaj tradukoj povas esti necesigataj per la kunteksto:

*ikšudamma še'am ištariq* "li alvenis **kaj** ŝtelis la hordeon" (§ 34)  
*šābam aṭrudma gušūrū ul ikšudū* "mi sendis laborantojn, **sed** trajtoj ne alvenis"











*awīlī šarūtīm taṭarradma ipaṭṭarūnim* "**se** vi sendas riĉajn virojn, ili dizertos"

*šupurma bā'irī lisniqūnikkum* "skribu, **tiel ke** ili kunvenigas militistajn helptrupojn por vi".

#### Vokablaro

<i>adi</i> (prep.): ĝis, kune kun; (konj.) : tiel longe kiel	<i>kittum</i> (i. de <i>kīnum</i> ): ver(eco), justeco; pl. <i>kīnātum</i> : justeco
<i>ana mīnim, ammīni(m)</i> : kial	<i>lāma</i> : antaŭ ol
<i>anāku</i> : mi	<i>lū ... lū</i> : aŭ ... aŭ
<i>anumma</i> : nun, per tiu ĉi	<i>-ma</i> : (emfaza partikulo; kunliga partikulo)
<i>balāṭum (u)</i> : vivi, esti sana	<i>mārtum</i> : filino
<i>gimillum</i> : favoro	<i>narûm</i> (< NA <sub>4</sub> .RU.A): steleo
<i>ḥalāqum (i)</i> : perdiĝi, esti detruata, perej	<i>rīmum</i> : amata
<i>inūma</i> : kiam	<i>dSîn</i> : la lundio
<i>kī'am</i> : tiel, kiel sekvas	<i>sinništum</i> : virino
<i>kirûm</i> < <i>*kiri'um</i> : (frukto-)ĝardeno	<i>ša</i> : kiu, al kiu (vidu § 37)
<i>šarrāqum</i> : ŝtelisto, ŝtelinto	<i>šapārum (a/u)</i> : sendi; sendi (leteron), skribi ("al" = dat.)
<i>šaṭārum (a/u)</i> : skribi	<i>ū</i> : aŭ
<i>šiqlum</i> : siklo (pezunuo = ĉ. 8,3 gramoj)	<i>ul</i> : ne
<i>tamkārum</i> : komercisto	<i>walādum</i> (prez. <i>ullad</i> , pret. <i>ūlid</i> ): naski
<i>tarādum (a/u)</i> : sendi (personon)	<i>warki</i> : malantaŭ, post
<i>ṭēmum (*ṭ'm)</i> : novaĵoj, raporto, decido	

## Kojnoskribaj signoj

Signoj	Fonetika	Logografia
	<i>nu</i>	NU = <i>ul, lā</i> "ne"
	<i>ri, re, (dal), tal, řal</i>	
	<i>al</i>	
	<i>da, řa</i>	
	<i>ma</i>	
	<i>řa</i>	
	<i>mi, mé, řil</i>	GE <sub>6</sub> = <i>mūřum</i> "nokto" GE <sub>6</sub> = <i>řalmum</i> "nigra" SILIM = <i>řulmum</i> "sano"
	<i>di, ři, de, ře</i>	SÁ en SÁ.SÁ = <i>kařādum</i> "atingi" KI = <i>erřetum</i> "tero"
	<i>ki, ke, qí, qé</i>	KI = <i>ařrum</i> "loko" (ankaŭ kiel determinativo: <i>Babilum</i> <sup>ki</sup> )
	<i>ku, qú, (dúr, tuř)</i>	DÚR = <i>wařābum</i> "sidi, loĝi"

## Ekzerco

1. Normaligu kaj traduku: *a-wi-lum řar-ra-aq. řum-ma māru-řu ře-ře-er. sinniřtum ú-ul ař-řa-at. eqlum ki-ma na-ad-nu-ma na-di-in. sinniřtum řa mārī wa-al-da-at. a-na-ku mar-řa-ku. iz-za-kar. iř-ta-li-iq. iř-řa-ra-ad. iř-řa-ba-at. iř-řa-ba-as-si. a-nu-um-ma Ri-im<sup>d</sup> Sīn ař-řar-da-ak-kum. a-na Gi-mil-<sup>d</sup> Marduk ař-tap-ra-am. řum-ma mārum a-ba-řu im-ta-ha-ař ritta-řu i-na-ak-ki-su. řum-ma a-wi-lum mārat a-wi-lim im-řa-ař kaspam i-řa-qal. iř-řur-řum. am-mi-ni iř-pu-ra-am. ki-a-am iř-pu-ru-nim. řú-ur-da-ni-iř-řu-nu-ti. kasap iř-qú-lu. kasap tamkārum iř-qú-lu. a-wa-at iz-ku-ru. ařar il-li-ku. a-di ba-al-řa-at. ře<sub>4</sub>-em kirīm řu-up-ra-am. a-wa-at. mi-řa-ri-im řa i-na narīm ař-řú-ru. <sup>d</sup>Šamař ki-na-tim iř-ru-uk-řum.*

2. Konjugaciu en la stativo: *řalāqum, damqum, bēlum.*

3. Konjugaciu en la perfekto: *řařārum, řarādum, řalāqum, balāřum.*

4. Traduku en la akadan: Li estas ŝtelinto. Marduk kaj Anum estas ĉagrenaj. ĝi perdiĝis. Mi estas parolinta. ili estas parolintaj. li sendis al vi. li sendis la viron al vi. li donis al ili. li donis ilin. li iris. ŝi venis. post kiam li estis batinta la viron li skribis al mi. se li batis aŭ reĝon aŭ sklavon li pereos. li tranĉis la lignon kaj rompĝis ĝin (tiam).

## 5. Kojnoskribe:

ຖືກເຮັດ ເຊັ່ນ; ກິດເຮັດ ມາ ກິດ ຈາກ; ຖືກເຮັດ ມາ ຊຸມເຮັດ; ຖືກເຮັດ

ກິດເຮັດ ມາ ກິດ ຈາກ; ກິດເຮັດ ມາ ກິດ ຈາກ;

ກິດເຮັດ ມາ ກິດ ຈາກ; ກິດເຮັດ ມາ ກິດ ຈາກ; ກິດເຮັດ ມາ ກິດ ຈາກ; ກິດເຮັດ ມາ ກິດ ຈາກ;

ກິດເຮັດ ມາ ກິດ ຈາກ; ກິດເຮັດ ມາ ກິດ ຈາກ

## LECIONO 5

### GT-STAMO. MODALOJ. DEMONSTRATIVOJ KAJ INTEROGATIVOJ

§ 41. La **Gt-stamo** formiĝas per infiksado de *-t(a)-* en la G-stamon. La Gt-stamo estas uzata ĉefe por esprimi

(a) reciprokan (kelfoje refleksivan agadon:

*maĥārum* "esti vidalvide, renkonti", *mithurum* "starigi sin vidalvide"  
*magārum* "plaĉi, konsenti", *mitgurum* "(inter-)konsentiĝi"  
*ŝālum* "demandi", *ŝitūlum* "interkonsiliĝi",

(b) en verboj de movo, movon for de io (separa senco):

*alākum* "iri", *atlukum* "foriri"  
*elūm* "supreniĝi", *etlūm* "malaperi, forkuri"

Formoj:	Prez.	<i>iptarras</i>	<i>iptaqqid</i>	<i>irtaggum</i>
	Pret.	<i>iptaras</i>	<i>iptaqid</i>	<i>irtagum</i>
	Perf.	<i>iptatras</i>	<i>iptatqid</i>	<i>irtatgum</i>
	Part.	<i>muptarsum</i>	<i>muptaqdum</i>	<i>murtagmum</i>
	ing.	<i>muptaristum</i>	<i>muptaqittum</i>	<i>murtagimtum</i>
	Imp.	<i>pitras</i>	<i>pitqid</i>	<i>ritgum</i>
	Inf.	<i>pitrusum</i>	<i>pitqudum</i>	<i>ritgumum</i>
	V. Adj.	* <i>pitrusum</i>	* <i>pitqudum</i>	* <i>ritgumum</i>
	Stat.	<i>pitrus</i>	<i>pitqud</i>	<i>ritgum</i>

1. Konjugacio de ĉi tiuj formoj sekvas la paradigmon jam viditan en la G-stamo. Tiel prez. *iptarras*, *taptarras* ktp.; pret. (identita laŭ formo kun G-perf.: § 34 kun rim. 3) *iptaras*, pl. *iptarsū* < \**iptaras-ū*; imp. *pitras*, ing. *pitrasī*, plur. *pitrasā*; stat. *pitrus*, *pitrusat*.

2. Prez., pret., perf. kaj imp. havas la stamvokalon de la G-prez.; en la ceteraj formoj ĉiuj verboj havas la saman vokaligon.

3. Notu, ke en ĉiuj derivitaj stamoj (stamoj aliaj ol G) de la regula verbo, la infinitivo, verba adj. kaj stativo havas la saman bazan formon.

4. Pri la metatezo de komenca *d/t/s/ŝ/z* kun infiksa *t* en Gt-formoj sen prefikso (ekz. *tiŝbatā* < \**ŝitbatā* "kaptu unu la alian!", *tidkuŝat* < \**ditkuŝat* "ŝi estas reciproke ŝveliĝinta"), vidu § 83i. Pri asimilado de *t* al la unua radikalo en formoj kun prefikso (ekz. *igdapuŝ* < \**igtapuŝ* "li iĝis masa"), vidu § 83h.

5. En ĉiu simpla stamo la formoj de la perfekto estas identaj kun la preterito de t-stamo. Oni devas determini, ĉu tia formo estas (ekzemple) G-perf. aŭ Gt-pret. surbaze de la leksika atestado kaj de la kunteksto. Tiel *imtaĥsū* en militista kroniko estos normale prenata kiel Gt-pret. "ili batalis" konsidere al la bone atestita Gt-stamo *mithuŝum*, sed *iĥtabal* estos prenata kiel G-perf. "li estas farinta maljustaĵon", ĉar Gt \**ĥitbulum* ne estas atestita.

**§ 42. Volitivaj (modalaj) konstrukcioj.** Estas du formoj, kiuj esprimas pozitivan volon: la kohortativo kaj la prekativo. Du formoj esprimas negativan volon: la vetitivo kaj la prohibitivo.

**§ 43. La kohortativo** esprimas admonon en la unua persono pluralo; ĝi formiĝas per antaŭenmeto de la partikulo *i* al la preterito:

*i nimgur* "interkonsentu ni!"

**§ 44. La prekativo** esprimas deziron; ĝi formiĝas per antaŭenmeto de la partikulo *lū* al la stativo aŭ preterito:

*lū* + stativo esprimas deziritan staton kaj troviĝas kun ĉiuj personoj:

*lū balṭāta* "estu vi bonsana!"  
*lū dāri* "estu ĝi eterna!"

*lū* + preterito esprimas deziritan agon kaj troviĝas en la mnb. nur kun la unua pers. sing. kaj 3-a pers. sing. kaj plur. La partikulo *lū* interligas sin kun la komenca vokalo de la verbformo.; tiel en la babilona ĉiam *lu-*rezultas en la 1-a pers. sing. kaj *li-* en la 3-a pers. sing. kaj plur.:

*lukšud* "atingu mi!"  
*limḥaṣ* "batu li!"  
*lipqidū* "konfidu ili!"

Notu, ke la 1-a sing. prekativo estas ofte tradukata plej bone "mi deziras, "mi devas" aŭ per emfaza futuro: *lumḥaṣ* "mi volas bati, mi (vere) *batos*".

**§ 45. La partikulo lū** havas plian sencon, kiu devas esti klare distingata disde la prekativo: antaŭenmetate al verbo sen krazo, ĝi servas kiel emfaza partikulo:

*lū akšud* "mi vere (fakte) atingis"  
 komparu *lukšud* "atingu mi, mi volas atingi!" (prekativo).

**§ 46. La vetitivo** esprimas negativan deziron kaj troviĝas en ĉiuj personoj. Adresate al aŭ dirate pri aliaj personoj, ĝi ne havas la karakteron de ordono (lat. : *noli facere!*), sed de forta peto (lat. : *ne facias, ne faciat*) al super- kaj samranguloj. Ĝi estas esprimata per la partikulo *aj* (antaŭ vokalo) aŭ *ē* (antaŭ konsonanto) kaj la preterito:

*aj imḥur* "li ne ricevu!"  
*aj amraṣ* "mi ne malsaniĝu!"  
*ē taṭrudašši* "vi ne sendu ŝin !", "ne sendu ŝin!"

**§ 47. La prohibitivo** aŭ la negativa ordono formiĝas per antaŭenmeto de negativo *lā* al la prezento kaj troviĝas normale en la 2-a aŭ 3-a persono.

Tiu ĉi formo esprimas negativan imperativon: la imperativa formo (§ 27) ne povas aperi malantaŭ negativo.

*lā tapallaḥ* "ne timu!"

*libbaka lā imarraḥ* "via koro ne afliktiĝu!"

(komparu *ul tapallaḥ* "vi ne timas", *libbaka ul imarraḥ* "via koro ne afliktiĝis").

**§ 48. Demandoj** povas esti indikataj per interogativa pronomo (kiu?, kio?), adjektivo (kia?) aŭ adverbo (kial?, ktp.). Se tiuj ne ĉeestas, la demanda karaktero de la frazo povas esti indikata en la skribo per longigo de la lasta silabo de la plej grava vorto: *eqlētim i-ṣ-ab-ba-tu-ú ú-ul i-ṣa-ab-ba-tu-ú* (anstataŭ deklara *i-ṣa-ab-ba-tu*) "ĉu ili povas ekokupi la kampojn aŭ ne?". Ofte, tamen, demando ne estas grafike distingata disde deklaro; depende de la kunteksto *šarrī šū* povas signifi "li estas mia reĝo" aŭ "ĉu li estas mia reĝo?"

**§ 49. Demonstrativoj kaj interogativoj.** La demonstrativaj pronomoj estas *annûm* (*annium*), ing. *annitum* "ĉi tiu" kaj *ullûm* (*ullium*), ing. *ullitum* "tiu", kun normala adjektiva deklinacio. Ili povas esti uzataj sendepende (*annitam liqbi* "lasu lin diri ĉi tion") aŭ modifi substantivon (*šarrum ullûm* "tiu reĝo"). "La koncerna, tiu" (persono aŭ aĵo jam menciita) estas esprimata per la anafora pronomo de la 3-a persono *šū* (virg. sing. nom.), *šuāti* (virg. sing. obl.), *šiāti* (ing. sing. obl.), *šunūti* (virg. plur. obl.); ĉi tiuj povas esti uzataj sendepende aŭ modifi substantivon. (Plena deklinacio de *šū* estos prezentata en § 54).

La demandaj pronomoj estas *mannum* "kiu?" (gen. *mannim*, akuz. *mannam*) kaj *mīnum* "kio?" (gen. *mīnim*, akuz. *mīnam*): *mannum ikšudam* "kiu alvenis?", *mīnam iṣbat* "kion li kaptis?". Notu ankaŭ *ana mīnim*, *ammīnim* "kial, pro kio?"; *mīššu* "kio de tio?" (< \**mīn-šu* "ĝia kio?"). Estas ankaŭ sekundara formo de *mīnum* kun akcentŝoviĝo kaj longigo: *minûm*.

La demanda adjektivo *ajjûm* "kiu?, kia?" estas normale uzata kiel modifilo (*ina ajjītim mātīm* "en kiu lando?"), sed povas ankaŭ esti uzata sendepende (*ajjûm ikšudam* "kiu de ili alvenis?").

**§ 50. Negacio.** Estas du ĉefaj vortoj, kiuj esprimas negacion en la mnb., *ul* kaj *lā*. *ul* estas uzata por negacii deklarajn frazojn kaj demandajn frazojn, kiuj ne enhavas demandan pronomon, adjektivon aŭ adverbon. *lā* estas uzata por negacii subordigitajn propoziciojn (§ 37), kondiĉojn (§ 39), ordonojn (§ 47), demandajn frazojn, kiuj enhavas demandan pronomon, adjektivon aŭ adverbon kaj unuopajn vortojn aŭ frazpartojn:

*ul amḥur* "mi ne ricevis" aŭ "ĉu mi ne ricevis?"

*ul tapallaḥ* "vi ne timas" aŭ "ĉu vi ne timas?"

*lā tapallaḥ* "ne timu!"

*ul izkur* "li ne diris", *awīlum ša lā izkuru* "la viro, kiu ne diris"











*ammīnim lā taṭrudaššu* "kial vi ne sendis lin al mi?"

*awīlum lā muštālum* "malprudenta (aŭ malsaĝa) viro".

## Vokablaro

<i>ajjûm</i> : kiu, kio?	<i>karābum</i> (a/u): beni, saluti, preĝi (por = dat.)
<i>annûm</i> : ĉi tiu	<i>lā</i> : ne (§ 50)
<i>arĥiš</i> : rapide	<i>labāšum</i> (a): vesti, surmeti, porti (vestaĵon); Gt vesti sin, vesti (+ akuz.)
<i>baqārum</i> (a/u): postuli (leĝe)	D vesti iun (akuz.) kun (akuz.) Ŝ (metafore) involvi
<i>dabābum</i> (u): paroli	
<i>ĥattum</i> (kutime ing.), pl.	
<i>hattātum</i> : sceptro	
<i>labīrum</i> : maljuna	<i>rē'ûm</i> (G-part. de *r'i): paŝtisto
<i>magārum</i> (a/u): aprobi (akuz.), bonvenigi; Gt konsenti kun ( <i>itti</i> ) iu pri ( <i>ana</i> )	<i>ŝibtum</i> , konstr. <i>ŝibit</i> (*ŝbt): agrikultura bieno, proprieto
<i>mannum</i> : kiu?	<i>ŝalāmum</i> (i): esti nedifekta, esti sana
<i>mīnum, minûm</i> : kio?	<i>ŝû, ŝuāti, ŝiāti</i> : tiu; <i>ŝunûti</i> tiuj (§ 49)
<i>muštālum</i> (*ŝ'l): prudenta	<i>ullûm</i> : tiu
<i>qaqqadum</i> : kapo (servas ankaŭ kiel refleksiva pronomo: <i>qaqqadī</i> = "mi mem") <i>qaqqadum kabtum</i> : "la honorulo, honoro"	<i>watar</i> (absoluta stato uzata kiel adverbo): pli vaste, ekscese
	<i>dZarpanītum</i> (dŜarpanītum): diino, edzino de Marduk

## Kojnoskribaj signoj

Signoj	Fonetika	Logografia
	<i>ka</i>	KA = <i>pûm</i> "buŝo" DUG <sub>4</sub> = <i>qabûm</i> "diri" GÛ = <i>ŝasûm</i> "krii" INIM = <i>awātum</i> "vorto, afero" ZÛ = <i>ŝinnum</i> "dento"
	<i>la</i>	
	<i>li, le</i>	
	<i>ru, (ŝub)</i>	ŜUB = <i>nadûm</i> "ĵeti" ŜUB = <i>maqātum</i> "fali"
	<i>ab</i>	
	<i>ta, tá</i>	TA = <i>ištu</i> "el"
	<i>ú, ŝam</i>	Û = <i>ŝammum</i> "planto" KÛS = <i>ammatum</i> "ulno"
	<i>nim, num, (nù)</i>	
	<i>lu, (dib, dab)</i>	UDU = <i>immerum</i> "ŝafo" DAB = <i>ŝabātum</i> "kapti" DIB = <i>etēqum</i> "pasi"
	<i>ni, né, ì, lí, zal, (sal)</i>	Ï = <i>ŝamnum</i> "oleo"

Ekzerco

1. Normaligu kaj traduku: *šum-ma re'ûm be-el eqlim la im-ta-gàr. šarrum mu-uš-ta-lum. ki-ma aĥu-ka ŝu-ma-am ra-bi-am iš-ta-ak-nu. il-ta-ab-šu. i-na ma-ĥar* <sup>d</sup>*Zar-pa-ni-tum li-ik-ru-ba-am. pu-ru-sà-ši-na li-ip-ru-ús. ĥaṭṭa-šu li-iš-bi-ir. ši-bi-is-sú-nu la-bi-ra-am ki-ma ŝa-ab-tu-ma lu ŝa-ab-tu. <sup>d</sup>Marduk qá-qá-dam ka-ab-tam li-iš-ku-un-ka. lu-ú ŝa-al-ma-ta. la wa-tar i-ba-aq-qar. la il-la-ak. e ta-ap-la-aĥ. la ta-pa-al-la-aĥ. a-wi-lum ŝu-ú. a-ra-an di-nim ŝu-a-ti. wardam ŝu-a-ti. šarrī ŝu-nu-ti. sinništam ši-a-ti. an-ni-tam ar-ĥi-iš ŝu-up-ra-am. a-na ma-ni-im lu-ud-bu-ub. a-na ma-an-ni-im a-ša-ap-pa-ar.*

2. Donu la paradigmon de la Gt-stamo de *maĥārum*, sekvante la skemon de § 41, b supre. Konjugaciu *maĥārum* en la Gt-prez. kaj perf.

3. Traduku en la akadan: li vestis sin. li vestas sin. li estas vestinta sin (perf.). vestu vin! ne vestu vin! li vestu sin! ni vestu nin! ili ne konsentis kun la ŝtelintoj. ni *konsentis*. tiu sklavo ne estas honorata. ĉu ĉi tiu viro ne estas reĝo? Kion tiuj ŝafistoj ŝtelis? kial vi ne skribis al mi? ĉu vi ne skribis al mi?

4. Kojnoskribe:

𐎵𐎠𐎡𐎠𐎢𐎠𐎣𐎠𐎤𐎠𐎥𐎠𐎦𐎠𐎧𐎠𐎨𐎠𐎩𐎠𐎪𐎠𐎫𐎠𐎬𐎠𐎭𐎠𐎮𐎠𐎯𐎠𐎰𐎠𐎱𐎠𐎲𐎠𐎳𐎠𐎴𐎠𐎵𐎠𐎶𐎠𐎷𐎠𐎸𐎠𐎹𐎠𐎺𐎠𐎻𐎠𐎼𐎠𐎽𐎠𐎾𐎠𐎿𐎠𐏀𐎠𐏁𐎠𐏂𐎠𐏃𐎠𐏄𐎠𐏅𐎠𐏆𐎠𐏇𐎠𐏈𐎠𐏉𐎠𐏊𐎠𐏋𐎠𐏌𐎠𐏍𐎠𐏎𐎠𐏏𐎠𐏐𐎠𐏑𐎠𐏒𐎠𐏓𐎠𐏔𐎠𐏕𐎠𐏖𐎠𐏗𐎠𐏘𐎠𐏙𐎠𐏚𐎠𐏛𐎠𐏜𐎠𐏝𐎠𐏞𐎠𐏟𐎠𐏠𐎠𐏡𐎠𐏢𐎠𐏣𐎠𐏤𐎠𐏥𐎠𐏦𐎠𐏧𐎠𐏨𐎠𐏩𐎠𐏪𐎠𐏫𐎠𐏬𐎠𐏭𐎠𐏮𐎠𐏯𐎠𐏰𐎠𐏱𐎠𐏲𐎠𐏳𐎠𐏴𐎠𐏵𐎠𐏶𐎠𐏷𐎠𐏸𐎠𐏹𐎠𐏺𐎠𐏻𐎠𐏼𐎠𐏽𐎠𐏾𐎠𐏿𐎠𐏀𐎠𐏁𐎠𐏂𐎠𐏃𐎠𐏄𐎠𐏅𐎠𐏆𐎠𐏇𐎠𐏈𐎠𐏉𐎠𐏊𐎠𐏋𐎠𐏌𐎠𐏍𐎠𐏎𐎠𐏏𐎠𐏐𐎠𐏑𐎠𐏒𐎠𐏓𐎠𐏔𐎠𐏕𐎠𐏖𐎠𐏗𐎠𐏘𐎠𐏙𐎠𐏚𐎠𐏛𐎠𐏜𐎠𐏝𐎠𐏞𐎠𐏟𐎠𐏠𐎠𐏡𐎠𐏢𐎠𐏣𐎠𐏤𐎠𐏥𐎠𐏦𐎠𐏧𐎠𐏨𐎠𐏩𐎠𐏪𐎠𐏫𐎠𐏬𐎠𐏭𐎠𐏮𐎠𐏯𐎠𐏰𐎠𐏱𐎠𐏲𐎠𐏳𐎠𐏴𐎠𐏵𐎠𐏶𐎠𐏷𐎠𐏸𐎠𐏹𐎠𐏺𐎠𐏻𐎠𐏼𐎠𐏽𐎠𐏾𐎠𐏿𐎠𐏀𐎠𐏁𐎠𐏂𐎠𐏃𐎠𐏄𐎠𐏅𐎠𐏆𐎠𐏇𐎠𐏈𐎠𐏉𐎠𐏊𐎠𐏋𐎠𐏌𐎠𐏍𐎠𐏎𐎠𐏏𐎠𐏐𐎠𐏑𐎠𐏒𐎠𐏓𐎠𐏔𐎠𐏕𐎠𐏖𐎠𐏗𐎠𐏘𐎠𐏙𐎠𐏚𐎠𐏛𐎠𐏜𐎠𐏝𐎠𐏞𐎠𐏟𐎠𐏠



## LECIONO 6

### D-, Ŝ-, DT-, ŜT-STAMOJ. SENDEPENDAJ PRONOMOJ

§ 51. **D kaj Ŝ-stamoj** kaj iliaj t- kaj tn-stamoj havas unuforman vokalan paradigmon en ĉiuj fortaj verboj, escepte de la G- kaj N-stamoj, kiuj distingas la verbojn per vokalklaso.

§ 52. **La D-stamo** karakteriziĝas per duobliĝo de la meza radikalo kaj per la prefiksa vokalo *-u* en prez., pret. kaj perf. La D-stamo havas du bazajn sencojn: (1) en kaj statverboj kaj agverboj ĝi povas indiki la faktitivan, t.e. la kaŭzativon de la stato signatan per la G-stativo:

*damiq* "li estas bona", *dummuqum* "bonigi, fari bona"  
*salim* "li estas amika", *sullumum* "igi amika, fari pacon kun"  
*lamid* "li estas lerninta", *lummudum* "instrui"

(2) kun ag-verboj la D-stamo povas esprimi multnombrecon de ago aŭ ĝia objekto (la tiel-nomata Poebel Piel):

*iŝbir* "li rompis (unu objekton)", *uŝebbir* "li rompis (multajn), li frakasis (unun)"  
*ŝēpīja iššiḳ* "li kisis miajn piedojn", *ŝēpīja unaŝšiḳ* "li kisis miajn piedojn (ripetfoje)".

**La Dt-stamo** havas la pasivon al D-stamo kiel bazan sencon:

*ŝalāmum* "esti sana", *ŝullumum* "sanigi", *ŝutallumum* "esti sanigata".

	D	Dt
Formoj:		
Prez.	<i>uparras</i>	<i>uptarras</i>
Pret.	<i>uparris</i>	<i>uptarris</i>
Perf.	<i>uptarris</i>	<i>uptarris</i>
Part.	<i>muparrisum</i>	<i>muptarrisum</i>
Imp.	<i>purris</i>	<i>putarris</i>
Inf.	<i>purrusum</i>	<i>putarrusum</i>
V. Adj.	<i>purrusum</i>	* <i>putarrusum</i>
Stat.	<i>purrus</i>	* <i>putarrus</i>

La konjugacio de ĉi tiuj formoj sekvas la paradigmon jam konatan: tiel D-prez. *uparras*, *tuparras*, *tuparrasī*, *uparras*; *uparrasū*, *uparrasā*, *tuparrasā*, *nuparras*; la prekativo de la 1-a pers. sing. *liparris*, 3-a pers. sing. *liparris*.

§ 53. **La Ŝ-stamo** karakteriziĝas per la prefikso *ŝ(a)* kaj la prefiksivokalo *-u*. Ĝia vokalparadigmo estas paralela al tiu de la D-stamo. La baza senco de la Ŝ-stamo estas kaŭzativa, t.e. la subjekto kaŭzas duan personon aŭ aĵon realigi agon aŭ procedon specifikata per la verba G-stamo:

*ikšudam* "li alvenis", *ušaksidaššu* "mi igis lin alveni"  
*arpud* "mi kuris", *tušarpidanni* "vi igis min kuri"

En stat-verboj la Ŝ-stamo povas ankaŭ esprimi la faktitivon kiel la D-stamo:

*amruŝ* "mi malsaniĝis", *uŝamriŝanni* "li igis min malsaniĝi"

**La Ŝt-stamo** havas du uzojn respondantajn al du diferencaj formoj de la prezenco; ĉiuj aliaj formoj estas la sama por ambaŭ uzoj. (1) la Ŝt-stamo povas servi kiel pasivo al la Ŝ-stamo (Ŝt<sub>1</sub>). En ĉi tiu uzo la prezenco aperas en la mallonga formo *uŝtapras*, sen ĝemeliĝo de la meza radikalo; ĉar la verba adjektivo kaj stativo de la Ŝ-stamo estas jam pasiva laŭ senco, la pasiva Ŝt-stamo ne havas verban adjektivon aŭ stativon:

*uŝtalpit* "estis detruita" (kp. *ŝulputum* "detrui");

(2) pli kutima estas la tiel-nomata leksika Ŝt-stamo (Ŝt<sub>2</sub>), ĝenerala termino por tiuj kazoj, en kiuj la Ŝt-stamo staras en variaj nepasivaj rilatoj (aŭ en malklara rilato) al la responda G-stamo kaj al aliaj stamoj. En la prezenco aperas la ĝemeliĝinta formo *uŝtaparras*:

*mārī ŝiprim uŝtaŝbit* "mi kunvenigis mesaĝistojn" (kaŭzativo al la reciproka Gt-stamo de *ŝabātum* "kapti unu la alian, esti kunigata")  
*ŝābam itti ŝābim ŝutēmid* "kunigu la trupojn kun la (aliaj) trupoj!"  
 (kaŭzativo al la reciproka N-stamo de *emēdum* "esti kunigata, kunveni")  
*nāram uŝtēŝiram* "Mi tenis la kanalon en bona ordo" (aldonas tempan plilongigon al *esērum* Ŝ "ordigi ion")  
*ul uŝtamarraŝ* "li ne maltrankviliĝos" (*marāŝum* "esti malsana")  
*ŝutābulum* "interpreti, kalkuli" (*wabālum* "transporti").

	Ŝ	Ŝt
Formoj: Prez.	<i>uŝapras</i>	<i>uŝtapras/uŝtaparras</i>
Pret.	<i>uŝapris</i>	<i>uŝtapris</i>
Perf.	<i>uŝtapris</i>	<i>uŝtatapris</i>
Part.	<i>muŝaprisum</i>	<i>muŝtaprisum</i>
Imp.	<i>ŝupris</i>	<i>ŝutapris</i>
Inf.	<i>ŝuprusum</i>	<i>ŝutaprusum</i>
V. Adj.	<i>ŝuprusum</i>	<i>ŝutaprusum</i>
Stat.	<i>ŝuprus</i>	<i>ŝutaprus</i>

La konjugacio de ĉi tiuj formoj sekvas la paradigmon jam konatan: tiel Ŝ-prez. *uŝapras*, *tuŝapras*, *tuŝaprasī*, *uŝapras*; *uŝaprasū*, *uŝaprasā*, *tuŝaprasā*, *nuŝapras*; (Pri la ŝanĝiĝo de mnb. *uŝt-* al *ult-* en la pli malfrua babilona, vidu § 83,1.)

§ 54. La sendependaj pronomoj havas tri formojn:

	Nom.	Gen.-Akuz.	Dat.
Sing.	1.	<i>anāku jāti</i>	<i>jāšim</i>
	2v.	<i>atta kâti (kâta)</i>	<i>kâšim</i>
	2i.	<i>atti kâti</i>	<i>kâšim</i>
	3v.	<i>šū šuāti (šuātu, ŝāti/u)</i>	<i>šuāšim (ŝāšim)</i>
	3i.	<i>ŝī ŝiāti (ŝuāti, ŝāti)</i>	<i>ŝiāšim (ŝuāšim, ŝāšim)</i>
Pl.	1.	<i>nīnu niāti</i>	<i>niāšim</i>
	2v.	<i>attunu kunūti</i>	<i>kunūšim</i>
	2i.	<i>attina kināti</i>	<i>*kināšim</i>
	3v.	<i>ŝunu ŝunūti</i>	<i>ŝunūšim</i>
	3i.	<i>ŝina ŝināti</i>	<i>*ŝināšim</i>

1. Estas klare el la paradigmo, ke virgenro kaj ingenro ofte kunfandiĝas; la enkonduko de la finaĵoj *-a*, *-u* en kelkaj tekstgrupoj estas sekundara disvolviĝo, kiu rezultigis novajn diferencigajn formojn de la virg. La mimacio en la dativo estas kelkfoje perdiĝinta en la *mnb.* kaj regule post tio; kun ĝia perdiĝo la semantika distingo inter dativaj kaj akuzativaj formoj estas kreske perdiĝinta.

2. **Uzo kun prepozicioj.** Kelkaj prepozicioj estas uzataj kun pronomaj sufiksoj (*ittika*; kp. § 20; § 84i), aliaj kun sendependaj pronomoj en la genitivo (*kīma jāti*). *ana* estas escepto: ĝi estas normale uzata pleonasme kun sendependa pronomo en la dativo (*ana jāšim taddinam* "vi donis al mi").

3. **Uzo kun verboj.** Senemfaza pronoma subjekto estas esprimata per la verbformo mem; senemfaza pronoma objekto estas esprimata per sufiksoj (§ 35). Sendependa pronomo aldonita al ĉi tiuj indikas emfazon:

*atta bā'irī annikī'am siniq* "vi mem inspektu trupojn ĉi tie!"  
*jāti gimlanni* "faru al mi favoron!"  
*atta marŝāta* "vi mem estas malsana".

4. **Uzo en nomaj frazoj.** Predikativo de la tipo "vi estas (bona) reĝo" alprenas du formojn, la stativon (§ 33) kaj la noman frazon kun *-ma* aŭ sendependa pronomo (§ 31). La stativo povas nur esti uzata, se la predikato estas nekvalifikita (*ŝarrāku* "mi estas reĝo"); la noma frazo kun sendependa pronomo povas nur esti uzata, se la predikato estas kvalifikita: *ŝarrī atta* "vi estas *mia* reĝo", *ŝar mātīm atta* "vi estas reĝo *de la lando*".

5. Ni vidis (§ 49), ke la formoj de la 3-a persono povas ankaŭ esti uzataj adjektive en la nominativo, genitivo kaj akuzativo (*bīt awīlim šuāti* "la domo de tiu viro").

## Vokablaro

*abbuttum*: sklavbuklo (frizaĵa karakterizaĵo de sklavoj)

*Aja*: diino, edzino de Ŝamaŝ

*ālum*: urbo

*bulluṭum (D)*: sanigi, doni vivon  
*gigunûm* < \**giguna'um*: "terasa templo"

*gullubum (D)*: (for-) razi, (for-) razi sin

*ḥulluqum (D)*: detru

*išdum*: fundamento (ofte dualo)

*kamārum (a/u) G kaj D*: amasigi, stapli

*Kiš*: (urbo)

*lamādum (a)*: lerni; D instrui, informi

*mēreštum (\*ḥrt)*: kultivado; kampo

*Meslam* : nomo de templo (sum.)

*mimma ŝumšu*: ĉio ajn, ĉio (laŭv. kio ajn lia nomo)

*rapāšum (i)*: esti larĝa; D larĝigi, abundigi

*sanāqum (i)*: fariĝi malvasta; G kaj D ekzameni, kontroli

*sarrum*: malsincera, mensoga

*šubātum*: vestaĵo, tuniko

*šadālum (i)*: esti vasta; D (pli-) vastigi

*še'um*: hordeo

*šuklulum (Š)*: perfektigi, kompletigi

*šuršudum (Š)*: fondi firme

*têrtum*, pl. *têrêrtum* (\*w'r): komando, ordono; (viktimspektado) aŭguro

*umma*: tiel (diras)

*warqum*: verda, flavaverda

## Kojnoskribaj signoj

Signoj	Fonetika	Logografia
	<i>ḥal</i>	
	<i>mu</i>	MU = <i>šumum</i> "nomo" MU = <i>zakārum</i> "paroli" MU = -i <sub>14</sub> , -ia <sub>5</sub> "mia"
	<i>ag</i>	
	<i>ŝum, (tag)</i>	TAG = <i>lapātum</i> "tuŝi"
	<i>il</i>	
	<i>iŝ, mil</i>	
	<i>bi, bé, pí, pé, (kaŝ, kás, gaŝ)</i>	KAŠ = <i>ŝikarum</i> "biero"
	<i>ni, né, ì, lí, zal, (ŝal)</i>	Ì = <i>ŝamnum</i> "oleo"
	<i>ar</i>	
	<i>eŝ, (sin)</i>	XXX = "30" dXXX = <i>Sîn</i> (lundio)
	<i>me, (ŝib, sib)</i>	ME = plurala determinativo (mallonga formo de MEŠ, signolisto, leciono 1)
	<i>ŝal, (sal, rag, mim)</i>	MÌ, MUNUS = <i>sinništum</i> "virino"

Ekzerco

1. Normaligu kaj traduku: *a-wi-lam ub-ta-al-li-iṭ. ab-bu-ti wardim ug-da-al-li-ib (kp. §83h). ki-a-am ú-lam-mi-da-an-ni. mu-kam-me-er nu-úḥ-ši-im. mu-ra-ap-pí-iš mi-im-ma šum-šu a-na Mes-lam. a-al-šu ú-ḥa-al-la-aq. aš-šum še-e-im ša ús-sà-an-na-qu. mu-šar-ši-id šu-ba-at uruKiški. šar-ru-tam da-rítam ša ki-ma ša-me-e ù er-še-tim iš-da-ša šu-úr-šu-da. mu-ša-al-bi-iš wa-ar-qi-im gi-gu-ne-e <sup>d</sup>A-a. mu-ša-ad-di-il me-re-eš-tim. mu-ša-ak-li-il te-re-tim. šu-ma i-il-la-ak. um-ma šu-ú-ma. sa-ar-ru-tim šu-nu-ti. ki-ma ia-ti. a-na ka-ši-im.*

2. Donu la paradigmon de la stamoj D, Dt, Š kaj Št de *šapārum*. Konjugaciu la saman verbon en la pret. D kaj perf. Š.

3. Traduku en la akadan: li sanigis ilin. ili estis sanigitaj. li plilarĝigis la fundamenton. la kamparanoj perfektigas la teron. kiu estas kiel vi? ni estas juĝistoj. ni estas viaj juĝistoj. li vestis min per mantelo. li pereis. li detruis la urbon. estis mi (vidu § 54,3), kiu detruis ĝin. estis mi, al kiu ili donis la arĝenton.

4. Kojnoskribe:

𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶;  
𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶;  
𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶;  
𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶;  
𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶;  
𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶;  
𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶;  
𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶; 𐎶𐎺𐎠𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶𐎶

## LECIONO 7

### STAMOJ N, TN, ŜD. NEDIFINAJ PRONOMOJ

§ 55. La **N-stamo** karakteriziĝas per *na-* prefiksata al la verba radiko en la imperativo, infinitivo, verba adjektivo kaj stativo kaj en la aliaj formoj per infiksata *-n-*, kiu asimiliĝas al la sekva konsonanto.

La baza funkcio de la N-stamo de ag-verboj estas pasivo al la G-stamo (*iĥabbal* li faras maljustaĵon", *iĥabbal* "okazis maljustaĵo al li"); malofte ĝi havas refleksivan (imlik "li konsilis", immalik "li (inter-) konsiliĝis") aŭ reciprokan signifon (*isbatū* "ili kaptis", *nasbutū* "ili kverelas [ekkaptante unu la alian]"). La N-stamo de stat-verboj kutime esprimas ingresivon (*nadrū* "ili furiozas, ili estas furiozaj", *innadrū* "ili tumultas"). Deponenta N-stamo ankaŭ troviĝas kun la senco de normala G-stamo (*naplusum* "rigardi", transitivo).

La vokala sistemo de la N-stamo estas miksitaj: verboj de la *a/u*-klaso, *a*-klaso kaj ĝenerale ankaŭ de la *u*-klaso montras la stamvokalon *a* en la prez. kaj perf., *i* en la pret. kaj imp. Verboj de la *i*-klaso konservas sian karakterizan vokalon tute. La fina vokalo de la pret. estas eliziata antaŭ finaĵo: *ipparis* + *ū* > *ipparsū*.

	<i>a/u</i>		<i>a</i>	<i>i</i>
Prez.	<i>ipparras</i>	< <i>*inparras</i>	<i>immahhas</i>	<i>ippaqqid</i>
Pret.	<i>ipparis</i>	< <i>*inparis</i>	<i>immahis</i>	<i>ippaqid</i>
Perf.	<i>ittapris</i>	< <i>*intapras</i>	<i>ittamhas</i>	<i>ittapqid</i>
Ptc.	<i>mupparsum</i>	< <i>*munparisum</i>	<i>mummahsum</i>	<i>muppaqdum</i>
Imp.	<i>napris</i>		<i>namhis</i>	<i>napqid</i>
Inf.	<i>naprusum</i>		<i>namhusum</i>	<i>napqudum</i>
V. Adj.	<i>naprusum</i>		<i>namhusum</i>	<i>napqudum</i>
Stat.	<i>naprus</i>		<i>namhus</i>	<i>napqud</i>

§ 56. **Nt-stamo**, se ĝi iam ekzistis, estas malofta: kp. GAG Erg. § 95d.

§ 57. La **tn-stamoj**. Ĉiuj kvar bazaj stamoj povas esti aŭgmentataj per infikso *-tan-* (Gtn = I/3, Dtn = II/3, Ŝtn = III/3, Ntn = IV/3). La infikso estas plej facile ekkonebla en la prezenco, dume en aliaj formoj la *-n-* de la infikso aŭ asimiliĝas al la sekva konsonanto aŭ estas subpremata komplete por eviti la sinsekvon de tri konsonantoj (§ 83n).

La vokalsistemo de Dtn kaj Ŝtn estas la sama ĉe ĉiuj verboj kaj estas analoga al tiuj de D kaj Ŝ. La stamvokalo de prez., pret., perf. kaj imp. en Gtn estas la sama kiel tiu de la G-prez., en la Ntn la sama kiel tiu de la N-prez.

La tn-stamoj havas habitativan-iterativan signifon., t.e. ili indikas agon kiel laŭkutiman aŭ kiel ripetatan. La kromsignifo povas esti tradukata per helpverbo aŭ per adverbo "ĉiam denove, daŭre", ktp.

*irappud* "li kuras", *irtanappud* "li daŭrigas kuri"  
*aŝappar* "mi skribas", *aŝtanappar* "mi daŭre skribas"

	Gtn		Dtn
Prez.	<i>iptanarras</i>		<i>uptanarras</i>
Pret.	<i>iptarras</i>	< * <i>ip-tan-ras</i>	<i>uptarris</i>
Perf.	<i>iptatarras</i>	< * <i>ip-ta-tam-ras</i>	<i>uptatarris</i>
Ptc.	<i>muptarrisum</i>	< * <i>mup-tan-risum</i>	<i>muptarrisum</i>
Imp.	<i>pitarras</i>	< * <i>pi-tan-ras</i>	<i>putarris</i>
Inf.	<i>pitarrusum</i>	< * <i>pi-tan-rusum</i>	<i>putarrusum</i>
V. Adj.	<i>pitarrusum</i>		<i>putarrusum</i>
Stat.	<i>pitarrus</i>		<i>putarrus</i>
	Ntn		Ŝtn
Prez.	<i>ittanapras</i>	< * <i>in-tana-pras</i>	<i>uŝtanapras</i>
Pret.	<i>ittapras</i>	< * <i>in-tan-pras</i>	<i>uŝtapris</i>
Perf.	* <i>ittatapras</i>	< * <i>in-tan-ta-pras</i>	<i>uŝtatapris</i>
Ptc.	<i>muttaprisum</i>	< * <i>mun-tan-prisum</i>	<i>muŝtaprisum</i>
Imp.	<i>itapras</i>	< * <i>ni-tanpras</i>	<i>ŝutapris</i>
Inf.	<i>itaprusum</i>	< * <i>ni-tan-prusum</i>	<i>ŝutaprusum</i>
V. Adj.	* <i>itaprusum</i>		<i>ŝutaprusum</i>
Stat.	<i>itaprus</i>		<i>ŝutaprus</i>

Notu, ke la Gtn-pret. estas forme identa kun la Gt-prez.; Dtn kaj Ŝtn diferencas disde Dt kaj Ŝt forme nur en la prez. Se formo estas trovata, kiu estas komuna al ambaŭ stamoj, la stamo, al kiu ĝi apartenas, devas esti determinata per senco kaj kunteksto kaj per gramatikaj kriterioj; tiukaze *liptarras* devas esti (ĉar ĝi estas prekativo, vidu § 44) Gtn-pret., ne Gt-prez.

